

EL POPOLA


ĈINIO

中國報道

3

1978





Agrikultura meĥanizado en Vuming-gubernio

En rikolta sezono

En la kamparo de Vuming-gubernio de Guangxi ĉie regas labora ĝojo dum la sezonoj por rikoltado kaj semado. Sur kampoj plenergie laboras kambaĵoj kaj traktoroj kaj sur draŝejoj bruas draŝmaŝinoj kaj ventummaŝinoj. Multe ŝanĝiĝis la antaŭa fizionomio, ke oni plugis, transplantis kaj draŝis per homaj fortoj.

Sub la gvido de la Partio kaj laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, ke **“la fundamenta elirejo de agrikulturo estas meĥanizado”**, la popolo de Vuming-gubernio energie entreprenis agrikulturan meĥanizadon, sin apogante sur la kolektiva ekonomio, kaj ricevis en tio ĝojindan sukceson. La nombro de agrikulturaj maŝinoj de la tuta gubernio kreskis kvaroble kompare kun tiu antaŭ kvin jaroj. Ĉiu produkta brigado havas 14 traktorojn meznombro. La 70% de la kampoj de la tuta gubernio estas plugata per maŝinoj kaj fundamente efektiviĝis meĥanizado kaj duonmeĥanizado de irigacio, rizido-transplantado, kampflegado, draŝado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flank-okupaj produktaĵoj. En la lastaj jaroj la gubernio kaj ĝiaj komunumoj kaj brigadoj kulturis pli ol 1,600 traktoristojn kaj 1,290 maŝinriparistojn.

Nun la gubernio funkciigis du fabrikojn por riparado kaj produktado de agrikulturaj maŝinoj, ĉiu el ĝiaj komunumoj havas riparan fabrikon de agrikulturaj maŝinoj kaj ĉiu brigado havas maŝinriparan grupon.

Ĝuang-nacieca traktoristino



Novtipa agrikul-
turilo en provado




Plugado





Draŝmaŝinoj produktitaj de fabriko de la gubernio



Agrikulturaj maŝinoj en konstruado de kampoj

Irigaciado





Ripari agrikulturilojn



Konstrui akvoutiligan instalajon kaj malgrandan hidroelektron laŭ lokaj kondiĉoj por disvolvi meĥanizadon de agrikulturo





Plugado en agava kampo


Meĥanizado stimulis pliprodukton de greno




Nova fizionomio de Tibeto

Prova geotermika elektrejo

Ĉe Jangbaĝjan apud Lasao de Tibeto konstruiĝis prova geotermika elektrejo, kies generatoro funkcias normale. Ĝia uzado akumulos sperton por ekspluati riĉan termofonton de Tibeto.



Vapora puto de la geotermika elektrejo, el kiu malseka vaporo povas ŝpruci ĝis alteco de 80 metroj (maldekstre de ĝi estas la geotermika elektrejo).



La geotermika elektrejo

Nova fizionomio de Tibeto



Riĉa rikolto de kultivejo en malvarma montregiono

Rikoltado


Pongbo-kultivejo je 4,000 metroj super la marnivelo gajnis riĉan rikolton de agrikulturo kaj paŝtado venkinte malvarmecon kaj hajlon en 1977, kaj ĝia totala produktokvanto de greno atingis la plej altan nivelon en la historio.

Selekto de semoj





La hajlo-preventa
grupo en laboro



Paŝtejo en mal-
varma montregiono



Vojflegado sur altebenaĵo

Parto de la vojo de Lazi ĝis Pulan

La vojflegantoj sur la Ŝikaze-Giagia Aŭtovojo de Tibeto laboradas sur loko je 4,700 metroj super la mara nivelo. Ili ne nur plilarĝigis la vojbazon kaj riparis kulvertojn, sed ankaŭ reformis vojkurbiĝojn, tiel ke la vojo ĉiam bone funkcias en la tuta jaro.



Tibetanaj
vojflegistinoj



Por glata trafiko

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1978

N-or 3

(234)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

P. 1. Taĝik-a (fronte) kaj ka-
zaĥ-a junulinoj de Hin-
giang

P. 4. Printempo



Enhavo

Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj (Daŭrigo) . . .	2
Antaŭen sur la vojo de agrikultura meĥanizado . . .	7
Por meĥanizi agrikulturon	12
Tangŝan en rekonstruado (Daŭrigo)	15
Eburoskulptisto Ĝu Jucaj	19
La aŭtovoja trafiko de Ĉinio	21
Kanto de la juneco (Daŭrigo)	25
KURANTAJ AFEROJ	31
AMIKECO: Ekspozicio de aŭstraliaj animal-speci- menoj en Ĉinio	32
ĈINAJ NACIECOJ: La sibo-oj kaj la rusoj	33
KALEJDOSKOPO: 1. Kamelioj de Junnan-provinco 2. Vegetala raŭpo	36
Esp-novaĵoj	37
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Ĉina-Japana Milito en 1894	38
Novaj ĉinaj esperantaj eldonaĵoj	40

Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj

(Daŭrigo)

Al Nankino ni certe revenos

En majo de 1946, kiam la flamo de interna milito tuj estis envolvonta la tutan Ĉinion, Kamarado Ĝoŭ Enlaj kun KPC-delegacio sub sia gvido venis de Ĉongking al Nankino por daŭrigi la traktadon kun la kuomintanga reakciularo. Lia loĝejo estis n-ro 30, strateto Mejjuanhincun de Nankino. Nun, eĉ la floroj kaj arboj en la korto vekas ĉe la vizitantoj profundan rememoron pri Ĝoŭ Enlaj. Surmure pendas foto de tiamaj li kaj Dong Bivu sub vinberarbedo en la korto, kaj ili aspektis tiel firmvolaj. Kiu tamen povas supozi, ke la kuomintanga reakciularo starigis pli ol dek spionajn punktojn ĉirkaŭ la domo de la delegacio, fore je malpli ol cent metroj, por fari al ĝi severan gvataĉon. Spionoj alivestitaj kiel kolportistoj, ŝuistoj, sortodivenistoj kaj tribiciklistoj observis en ĝia ĉirkaŭaĵo tage kaj nokte. Tamen Ĝoŭ Enlaj kaj Dong Bivu sintenis aplombe kaj senŝanceliĝe faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la malamikoj.

Por bari gvataĉon de la malamikoj, oni konstruis etaĝdometon ĉe la pordo de la loĝejo de la delegacio kaj plialtigis, je duono, la kortan ĉirkaŭmuron. Dum kunvenado de la delegacio, oni kuntiris la fenestrajn kurtenojn kaj metis radiatoricevilon sur fenestran breton, kiu laŭte

disaŭdigis novaĵojn el Jan-an por malhelpi subaŭskultadon de la malamikoj.

En tiuj tagoj, Ĉiang Kajŝek ludis kontraŭrevolucion artifikon, li devigite subskribis la Interkonsenton de la Deko de Oktobro kaj la Militĉesigan Interkonsenton¹, sed efektive li faris intrigadon. Antaŭ ol Ĉiang Kajŝek donis militĉesigan ordonon je la deka de januaro de 1946, li jam donis sekretan ordonon por okupi strategiajn lokojn. Post tio li daŭre ekspedis trupojn por ataki liberigitajn regionojn. Estis precipe serioze, ke la kuomintanga reakciularo faris grandskalan atakon al la liberigita regiono de centra Ĉinio.

Post veno al Nankino, Kamarado Ĝoŭ Enlaj tuj okazigis kunvenon de ĵurnalistoj ĉinaj kaj eksterlandaj, en kiu li malkaŝis la mensogon de Kuomintango pri senkonflikto en centra Ĉinio kaj severe admonis, ke antaŭ komenciĝo de la venonta traktado la kuomintanga registaro devos ĉesigi la internan militon en centra Ĉinio, por ke ĝi ne influu la tutan situacion kaj ne disvolviĝu en tutlandan internan militon. Finfine la reprezentantoj de Kuomintango kaj Usono devigite venis, kune kun Ĝoŭ Enlaj, al Hjuanhuan de la centra-ĉinia milita regiono por ĉeloke observi la kriman aktivadon de la usona kaj

*Kamarado Ĝoŭ Enlaj
en Nankino*




Ĉiang Kajŝek-a reakciularoj en atako al la liberigita regiono. La popolo de tiu loko montris al ili la fakton: “En la tri monatoj post dono de la ordono pri ĉesigo de la milito, nia liberigita regiono de centra Ĉinio estis atakita de Kuomintangoj je 114 fojoj. Premate de la tutlanda popolo, la usona kaj Ĉiang Kajŝek-a reakciularoj konsentis starigi Hjuanhuan-grupon sub la Bejping-a Plenuma Stabo por Reguligi Militajn Problemojn por kontroli efektivigon de la milit-ĉesiga interkonsento.

En la tempo, kiam G. C. Marshall, la speciala sendito de la usona prezidanto “pacigis” la du flankojn de la interna milito, la usona imperiismo helpis Ĉiang Kajŝek en transportado de granda kvanto da armeanoj al la fronto de la interna milito, ekipis la kuomintangajn trupojn per modernaj armiloj kaj starigis la usonan militan konsilantaron en Ĉinio. En la traktado Kamarado Ĝoŭ Enlaj malkaŝis, per granda kvanto da faktoj, la artifikon de Usono, kiu subtenis Ĉiang Kajŝek en la interna milito sub la nomo “pacigo”. Li demandis Marshall en sia memorando al la lasta: “Mi volas demandi, kien la usona registaro intencas meti vian ekscepcion kaj

Ambasadoron Leighton Stuart kiel siajn plenrajtajn senditojn kaj pacigantojn per tiel granda helpo kaj arma interveno?” La memorando trafis la doloran lokon de la usona imperiismo. Kaj la ĉina popolo pli klare konis la trompadon de la usona imperiismo en la “pacigo” kaj levis amasan movadon kontraŭ la komploto de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek kaj la interna milito.

En la akceptejoj de la n-ro 30, Mejjuanhincun, sub la vinberarbedo en la korto kaj en pitoreskaj lokoj en antaŭurbo de Nankino, Ĝoŭ Enlaj ofte akceptis demokratojn, fremdlandajn amikojn kaj raportistojn ĉinajn kaj fremdlandajn.

Vidante, ke Ĉiang Kajŝek perfidis la Milit-ĉesigan Interkonsenton kaj atakas liberigitajn regionojn, iuj el niaj amikoj tre maltrankviliĝis pri la rezultato de la paca traktado kaj dubis, ĉu la Komunista Partio de Ĉinio povas repuŝi la atakon de Kuomintangoj. Kun plena memfido, Kamarado Ĝoŭ Enlaj interparolis kun ili kaj montris: “Ŝajne la kuomintanga reakciularo estas timinda, sed fakte ĝi ne havas forton eksterordinaran. Ĝi perfidis la interkonsenton sub-



La 6-an de novembro 1946, Kamarado Ĝoŭ Enlaj okazigis kunvenon de ĵurnalistoj en la kunvenejo de KPC-delegacio en Nankino.

skribitan de ĝi mem, kaj tio ĝuste malkaŝis ĝin mem. Ĝia t.n. milita supereco estas provizora, la fina venko certe apartenos al la popolo.” Liaj brilaj kaj aplombaj okuloj kaj liaj vortoj saturitaj de la vero donis al la aŭskultantoj fidon kaj forton.

Pli ol monaton post kiam la Delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio atingis Nankinon, grandiozaj manifestacioj kontraŭ la interna milito kaj por paco kaj demokratio sinsekve okazis en la urboj Suĝoŭ, Hangĝoŭ kaj Ŝanhajo regataj de Kuomintango. Ŝanhajo sendis Ma Hjulun, Jan Baŭhang kaj aliajn pli ol dek reprezentantojn al Nankino por alvoki la kuomintangan registaron al paco kaj ĉesigo de la interna milito. Tuj post kiam la reprezentantoj atingis Hiaguan-stacion de Nankino, la embuskantaj kuomintangaj spionoj elsturmis kaj batis ilin. Tio estis Hiaguan-evento. Informiĝinte pri tio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj tre indigniĝis, tuj faris al la kuomintanga instanco seriozan proteston kaj venis en la nokto al la hospitalo, por konsoli la vunditajn reprezentantojn. Li emocie diris al ili: “Ni ne lasos vane forflui vian sangon.” Multaj ĉeestantoj emociiĝis ĝis larmoj.

Iuj reprezentantoj estis vunditaj tutkorpe kaj la vestoj disŝiritaj. Iu el ili diris al Ĝoŭ Enlaj: “En la pasinteco mi konsilis al vi, ke vi reduktu viajn armeojn kaj municion. Nun mi vidas, ke vi ne devas redukti eĉ unu soldaton, unu pafilon kaj unu kuglon.” Sinjoro Ma Hjulun, premante al Ĝoŭ la manon, diris al li: “Ĉinio povas meti sian esperon nur sur vin.”

Tiutempe, Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis tre okupata. Ĉiutage li laboris ĝis la tria horo matene kaj eĉ ĝis tagiĝo. Kvankam li ripozis tre malmulte, tamen li, ĉiufoje antaŭ ol enlitiĝi, iris en la konfidencan ĉambron por demandi, ĉu venis telegramo de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. Kelkfoje laborantoj respondis: “Jes, ĝi estas ricevata.” Li do sidiĝis kaj atendis, legante libron. Nur post lego de la telegramo kaj farinte necesan laboron, li enlitiĝis. Li ofte diris al siaj kamaradoj: “La tempo signifas venkon. Kiu pli frue publikigas la informon, tiu posedas iniciativon. Se venis urĝaj telegramoj de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio aŭ de la diversaj lokoj, vi tuj voku min kaj nepre ne perdu tempon.”

Kun disvolviĝo de la situacio, la batalo kontraŭ la malamiko fariĝis pli malfacila. Ĝoŭ Enlaj ofte laboris tutan nokton. Vidante tion, kamaradoj maltrankviliĝis pro lia sano. Foje, la partia filio faris decidon, ke li dormu antaŭ la 12-a nokte. Li dankis la kamaradojn pro la zorgo, sed ne plenumis la decidon. Li diris al ili: “Komisiita de la Centra Komitato de la Partio, Prezidanto Maŭ kaj la tuta popolo, nia delegacio venis ĉi tien por plenumi la gravan taskon de traktado. Tio koncernas la gravan aferon de vivo de la tuta lando kaj la tuta nacio. Komparante kun tio, mia ripozo kaj sano estas tute ne menciinda!” Aŭdinte la vortojn, la kamaradoj emociiĝis ĝis larmoj.

Sed, li tre zorgis aliajn laborantojn. Por sekurigi la konfidencajn laborantojn, li loĝis en la teretaĝo kaj loĝigis la pli ol 20 konfidencajn laborantojn en tri ĉambroj malaltajn kaj malvastajn de la dua etaĝo, kiuj servis kaj kiel laboraj ĉambroj kaj kiel dormejoj. Somero de Nankino estis fama pro varmego, kaj la duaetaĝaj ĉambretoj estis kvazaŭ vaporumiloj. Tamen Ĝoŭ ofte iris tien por vidi la kamaradojn. Li diris al ili: “Vi estas konfidencaj laborantoj kaj interkomunikantoj inter la supera kaj suba instancoj de la Partio. Mi loĝigis vin en la supra etaĝo por via sekuro. Mi loĝas en la teretaĝo kaj gardas por vi la pordon. Do vi laboru trankvile por la afero de la Partio.” Li ankaŭ admonis ĉiujn: “Laborante en blanka teroro kaj ĉirkaŭate de spionoj, vi ne iru eksteren, se vi ne havas urĝan aferon. Zorgu vian sanon, iru promeni en la korto post laboro kaj ludu tablotenison en la mata budo por fortigi la korpon.”


En tiuj malfacilaj tagoj, Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Deng Jingĉaŭ iris al Juhuataj por montri respekton al la revoluciaj martiroj. Ĉiufoje ili kolektis tie juhua-ŝtonetojn kaj metis ilin en pelvon sur tablo meze de la akceptejo de la delegacio por fari al la laborantoj edukon pri la revolucia tradicio. Kamaradino Deng Jingĉaŭ plurfoje diris: “Ĉiufoje, kiam mi vidis tiujn juhua-ŝtonetojn, mi ekpensis la sennombrajn revoluciajn martirojn.” Kamarado Guo Mojuo tiam ofte gastis ĉe KPĈ-delegacio kaj li tre emociiĝis de la ŝtonetoj. Li skribis en sia verko

«Impreso pri Nankino»: “La kvieteco, sereneco, fortikeco kaj senegoismo de juhua-ŝtoneto ŝajne simbolas la spiriton de la mastroj.”

La 19-a de oktobro de 1946 estis la 10-a datreveno de la forpaso de Sinjoro Lusin. Tiam streĉe iris la traktado inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj Kuomintango. Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉeestis, malgraŭ sia okupateco, la memorigan kunvenon okazigitan de la ŝanhajaj kulturaj rondoj. Li faris paroladon en la kunveno. Li diris: “En la jaro, kiam Sinjoro Lusin forpasis, ni jam komencis traktadon kun Kuomintango, ĝis nun ĝi jam daŭris dek jarojn. Mi tre malĝojas, ke ni ankoraŭ ne povas gajni eĉ iom da paco por la ĉina popolo. Tamen se la popolo unuiĝos, certe solviĝos la problemo de Ĉinio. Li citis la famajn versojn de Lusin “Brovkuntire spitas mi mil ulojn fingre min celantajn, kapklininte servas mi infanon vole kiel bovo”, kaj klarigis ke tio estas la direkto de Sinjoro Lusin kaj ankaŭ lia starpunkto. Li diris emocie: “Nun estas epoko de la popolo, kaj ĉio devas esti decidita de la popolo.” “Ni devas brovkuntire spiti kaj maltimi la reakciularon. Kaj al la popolo ni devas servi kiel bovo, sincere kaj fidele. Ni devas havi klarajn amon kaj malamon, kaj agi. Ni devas unuiĝi unuanime, klopodi por servi al la popolo ĝis la lasta spiro.”

Ĉu la vortoj diritaj de Kamarado Ĝoŭ Enlaj antaŭ 31 jaroj ne estas ĝuste priskribo pri lia brila batala vivo?

Spite al plurfoja opozicio de la Komunista Partio de Ĉinio, la kuomintanga reakciularo senskripule renversis la interkonsenton de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco², solflanke kunvokis la “Nacian Asembleon” je la 15-a de novembro de 1946 kaj ellaboris falsan konstitucion. Por protesti kontraŭ la krimo de la kuomintanga reakciularo en subfoso de la paca traktado, Kamarado Ĝoŭ Enlaj decidis reveni al Jan-an. Antaŭ la foriro li okazigis lastan kunvenon de ĉinaj kaj eksterlandaj ĵurnalistoj en la kunvena ĉambro de la KPĈ-delegacio en la n-ro 17, Mej-juan. Venis multaj ĵurnalistoj. La kunveno estis malgranda, kaj nemalmultaj ĵurnalistoj devis stari ĉe la pordo kaj la fenestroj aŭ en la



La labora ĉambro de Kamarado Ĝoŭ Enlaj en Mejjuanhincun

korto. Sur muro de la kunvenejo pendis mapo pri la atako de Kuomintango al la liberigitaj regionoj. Montrante ĝin, Ĝoŭ malkaŝis al la ĵurnalistoj la krimon de Ĉiang Kajŝek fari la kontraŭrevolucion internan militon kaj ataki la liberigitajn regionojn en ĉiuj frontoj, kaj eksplikis la principojn de la Komunista Partio de Ĉinio pri efektiviĝo de vera paco en firma unuiĝo kun la tutlanda popolo. Li solene proklamis, ke la Komunista Partio de Ĉinio absolute ne rekonas la falsan Nacian Asembleon kreitan sole de la kuomintanga reakciularo. Li diris: “Ni estas por paco. Se la kuomintanga reakciularo intencas ekstermi nin per armitaj fortoj, tion ni ne timas. Ni firme kredas, ke ni povas frakasi la atakon fare de Kuomintango kaj gajnos la Liberrigan Militon.

Iu ĵurnalisto demandis: “Ĉu Sinjoro Ĝoŭ revenos al Nankino, post la foriro al Jan-an?”

Kun plena memfido pri la venko, li respondis: “Al Nankino ni certe revenos.”

Laŭ lia tiama takso, ekzistis du eblecoj: Kuomintango suferos terurajn malvenkojn en la mi-

lito, kaj devos peti nin reveni al Nankino por traktado; aŭ ni revenos al Nankino en venko, kaj la ebleco de la lasta estas pli certa ol la unua. Kamarado Ĝoŭ Enlaj revenis al Jan-an je la 19-a de novembro 1946.


La afero iris ja laŭ la antaŭvido de Ĝoŭ Enlaj. La kuomintanga reakciularo fine disiris la Militĉesigan Interkonsenton kaj la Interkonsenton de la Deko de Oktobro subskribitajn de ĝi mem. Je la 17-a de februaro 1947, ĝi ordonis ke foriru ĉiuj laborantoj de la KPĈ-delegacio el Ŝanhajo, Ĉongking kaj Nankino. La 7-an de marto 1947, kiam Dong Bivu kaj aliaj kamaradoj forlasis Nankinon, reprezentantoj de diversaj rondoj alvenis por adiaŭo. Reprezentanto de Kuomintango por la traktado Ĝang Ĝigong diris al Dong: “Mi venas por adiaŭi vin.” Dong respondis: “Ni iros al Bejping post du aŭ tri jaroj. Tiam ni estos vin bonvenigantaj kaj vi fariĝos nia gasto.” Antaŭ ol Dong ascendis la aviadilon, li signifoplene diris al la adiaŭantoj: “Ni revidiĝos post nelonge.”

Baldaŭ efektiviĝis antaŭdiro de Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Dong Bivu en Nankino. La 21-an de aprilo 1949, miliono da bravaj batalantoj de ĈPLA transpasis la larĝan Jangzi-riveron, kaj en la 23-a ili hisis ruĝan flagon super la domo de la falsa prezidanto en Nankino. Liberiĝis Nankino, kiun la kuomintanga reakciularo reprezentata de Ĉiang Kajŝek regadis dum 22 jaroj.

(Fino)

1. La “Militĉesiga Interkonsento” estis komuna interkonsento pri ĉesigo de militaj konfliktoj, farita de la reprezentantoj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la kuomintanga registaro je la 10-a de januaro 1946. Ĝi difinis, ke la ambaŭflankaj armeoj devas ĉesigi militan aktivadon ĉe la respektivaj pozicioj de la noktomezo de la 13-a de januaro.

2. La “Politika Interkonsiliĝa Konferenco” estis okazigita de la reprezentantoj de Kuomintango, la Komunista Partio de Ĉinio kaj aliaj partioj kaj senpartiaj personoj, de la 10-a ĝis la 31-a de januaro 1946 en Ĉongking.



Buldozoj de Kangĝuang-komunumo de Gaŭmi-gubernio ebenigas grundon.

Antaŭen sur la vojo de agrikultura meĥanizado

de LONG LIN

KIEL iris la agrikultura meĥanizado de diversaj lokoj de Ĉinio en la lastaj jaroj? Kiel tio stas nun? Ĉu tio povos esti fundamente efektivigita en 1980? Tiuj demandoj estas zorgataj de multaj el niaj legantoj. En vintro de la pasinta jaro mi vizitis Ĉangvej-subprovincon de Ŝandong ĉe la orienta marbordo de Ĉinio.

Industrio de agrikulturaj maŝinoj en rapida disvolviĝo

Post 13-hora veturado per trajno mi atingis la centran urbon de la nomita subprovinco — Vejfang. En la komenco post la Liberiĝo la urbo havis nur 80,000 loĝantojn, sed nun ĝi jam havas 240,000. En ĝi troviĝas industrioj de fero kaj ŝtalo, maŝinoj, elektroniko, tekstilaĵoj, kemio kaj

aŭtoj kaj malpeza industrio. Ĝi estas industria bazo de la tuta subprovinco.

En la urbo mi unue rigardis fabrikojn de dizeloj, traktoroj kaj traktoraj akcesoraĵoj. La rapida progreso de la industrio de agrikulturaj maŝinoj de la subprovinco donis al mi profundan impreson.

Ĉangvej-subprovinco sin trovas en meznorda parto de Ŝandong-duoninsulo. Ĝi konsistas el 14 gubernioj kaj unu urbo, havas 10,000,000 loĝantojn kaj 1,133,000 hektarojn da agroj kaj estas unu el la ĉefaj produktoj de greno, kotono kaj tabako de Ŝandong-provinco. Antaŭ la Liberiĝo ĝi, same kiel aliaj regionoj de la lando, havis preskaŭ nenan modernan industrion. En

1966 Ĉangvej povis produkti nur ŝpatojn, falĉilojn, ŝovelilojn, pioĉojn kaj aliajn malgrandajn agrikulturilojn kaj nombron da plugiloj kun du radoj kaj du sokoĵ, norioj kaj aliaj duonmeĥanikaj agrikulturiloj. Poste, helpate de la ŝtato ĝi komencis produkti malgrandajn motorojn kaj akcesorajojn de agrikulturaj maŝinoj. En 1970 la tuta subprovinco havis tri dizelajn fabrikojn, kiuj povis produkti nur tri specojn de malgrandaj dizeloj. Ilia jara produktokvanto estis 2,600 sume kun 100,000 ĉevalpovoj. Nun la subprovinco havas 5 fabrikojn, kiuj povas produkti 6 specojn de dizeloj kun 8-185 ĉevalpovoj, kies jara produktokvanto estas 30,000 sume kun 1,300,000 ĉevalpovoj. Antaŭ 7 jaroj, la subprovinco ankoraŭ ne povis produkti traktorojn. Sed nun en ĝi jam estas tri traktoraj fabrikoj, kiuj povas produkti jare 9,000 traktorojn de tri tipoj.


De 1970 la subprovinco konstruis fermejon, karbominejon kaj feran fabrikon kaj pligrandigis la ŝtalan fabrikon de Vejfang, tiel ke formiĝis malgranda fera-ŝtala kompanio, kiu multe helpas la agrikulturan meĥanizadon de la loko.

Kial la subprovinco povas tiel rapide disvolvi industrion de agrikulturaj maŝinoj? La respondeculo de la subprovinco Liu Nan faris al mi jenan klarigon.


Antaŭ 7 jaroj, kiam oni diskutis pri efektivigo de agrikultura meĥanizado, iuj opiniis, ke en tio oni devas dependi de la ŝtato, ĉar la loko havas nek ŝtalon, nek teknikistojn, dum aliaj opiniis, ke la ŝtato malfacile povas kontentigi diversajn lokojn per livero de granda kvanto da agrikulturaj maŝinoj de multaj specoj. Por efektivigi fundamente agrikulturan meĥanizadon en Ĉangvej-subprovinco, ĉiu el ĝiaj brigadoj devas havi maŝinojn kun pli ol 200 ĉevalpovoj. Se oni nur dependos de la ŝtato, la agrikultura meĥanizado ne povos esti efektivigita eĉ post kelkdek jaroj. En tio oni vidis, ke nur se oni plenumos la principon de la Centra Komitato de la Partio "agrikulturaj maŝinoj devas esti fabrikitaj ĉefe de la lokoj" kaj plene disvolvos lokan aktivecon, oni povos rapide disvolvi agrikulturan meĥanizadon.

De 1970, laŭ la ŝtata plano, la dislokiĝo de la industriaj entreprenoj de la tuta provinco kaj la kondiĉoj de lokaj riĉfontoj, la subprovinco ellaboris projekton pri disvolvo de la lokaj industrioj kun poragrikultura industrio kiel la centro. Ĉar en la subprovinco abunde produktiĝas koton, tabako, ruĝa kanabo, kruda silko, beto kaj salo, oni do plenenergie disvolvas malpezan industrion de kotonŝpinado, silkteksado, cigaredo, salo kaj sukero. Dank' al tio oni ne nur prosperigis la

Traktoroj produktitaj de la Linkju-gubernia Traktora Fabriko



*Hijoŭ-komunumo de
Jehian-gubernio rikol-
tas tritikon.*



merkaton kaj multigis la eksportaĵojn, sed ankaŭ akumulis monon por disvolvi poragrikulturan industrion. En la lastaj jaroj oni uzis 80% de la lokaj monrimedoj por disvolvi industrion de agrikulturaj maŝinoj, kemisterko kaj krudaj materialoj. En la fino de la pasinta jaro la totala meĥanika forto de agrikulturiloj de la tuta subprovinco jam atingis 1,700,000 ĉevalpovojn kaj ĉiu brigado meznombre havis 140 ĉevalpovojn, t. e. sesoblo de tiuj de 1970. La maŝinplugata areo estas 66% de la tuta agraro, la maŝinsemata areo de tritikaj kampoj 73% kaj maŝinirigaciata areo superis 70%. En 1970 al ĉiu muo da kampo (1 muo = 1/15 hektaro) meznombre oni uzis 3.9 kilogramojn da kemia sterko produktita de la loko, sed nun jam 30 kilogramojn. Oni fundamente efektivigis meĥanizadon ankaŭ en draŝado, dispecigo de furaĝo kaj prilaborado de greno kaj aliaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj.

Valora kunlabora spirito

En la munta laborejo de la Ĉangvej-a Traktora Fabriko, mi vidis, ke muntitaj traktoroj 50-ĉevalpovaj de la marko Tajŝan estas veturigitaj unu post alia el la laborejo. Tiu traktoro povas esti uzata en akva kaj seka kampoj kaj ankaŭ

por transportado. Ĝi estas varme akceptata de kamparanoj pro ĝia facila manipulado, alta efikeco kaj malmulta konsumo de mazuto.

Antaŭe la fabriko estis traktora riparejo. Ekde 1975 ĝi komencis produkti traktorojn. La progreso de tiu fabriko montris, ke unu el la kialoj de la rapida disvolviĝo de la subprovinca industrio de agrikulturaj maŝinoj estas iri la vojon de organiziĝo. Por frue funkciigi gravan entreprenon, ili faris kunlaboron inter malsamaj fabrikoj, inter gubernioj kaj urbo, kaj inter ŝtataj kaj kolektivaj entreprenoj. La nomita fabriko ĝuste estis tiel konstruita. De 1975, 42 unuoj de 12 gubernioj kaj urbo de la tuta subprovinco partoprenis en la konstruado, disvolvante socialisman kunlaboran spiriton. En la konstruado ili venkis malfacilojn unu post alia, kaj aperis multaj kortuŝaj aferoj.

Kiam komenciĝis la konstruado, ĉiuj gubernioj, urbo, fabrikoj kaj eĉ minejoj konkure petis taskojn. La Komandejo de la Konstruado donis nenian taskon al Vulian-gubernio, konsiderante ke ĝi trovas sin en montregiono kaj havas malfacilan trafikon kaj relative malgrandan bazon de industrio. Tamen la gubernio sincere petis, ke ĝi iom kontribuu al la konstruado. Fine ĝi

estis taskita per fabrikado de unu speciala ilmaŝino. Informiĝinte pri konstruado de la fabriko, komunumanoj loĝantaj apud la konstruejo meminciate venis por peti taskon ordigi la konstruejon. Kiam finkonstruiĝis la novaj fabriksdomoj, ili alsendis siajn elektristojn por instali elektroliniojn.

La laboristoj de la Ĉangvej-a Konstrua Kompanio brave diris: "Kiel ajn multaj kaj grandaj estos la malfaciloj, ni tamen povos ilin venki." Ili laboris tage kaj nokte kaj fine tre bone plenumis sian taskon de domkonstruado.

Por ke la koncernaj fabrikoj frue ricevu desegnaĵojn, laborantoj por projektado de la specialaj ilmaŝinoj ellaboris pli ol 19,000 desegnaĵojn en malpli ol du monatoj.

La fabrikoj, kiuj estas taskitaj por produkti specialajn ilmaŝinojn, komisiis la ricevitan taskon al specialaj personoj kaj metis ĝian plenumon en la unuan lokon. La dizelakcesoraja fabriko de Gaŭmi-gubernio sendis tri teknikistojn por eskorti la du specialajn ilmaŝinojn produktitajn de ĝi al la traktora fabriko por helpi ĝin en muntado kaj provfunkciigo de la maŝinoj, kaj ili foriris nur kiam la maŝinoj produktis la unuajn normajn maŝinpartojn.

Dank' al la harmonia kunlaboro de diversaj unuoj, en 7 monatoj jam finiĝis la konstruado de 12,300 kvadrataj metroj, fabrikiĝis 96 specialaj ilmaŝinoj kaj formiĝis 7 produktaj linioj kun jara produktivo de mil traktoroj. En tiu jaro la fabriko jam produktis pli ol 300 traktorojn. Ĉijare ĝi plenumis la taskon produkti 1,500 traktorojn je unu monato pli frue.

Krome, la Komandejo de la Konstruado organizis 21 unuojn de 9 gubernioj kaj urbo por fari 185 specojn de maŝinpartoj de la traktoro, tiamaniere oni ne nur elfosis latentan forton de ekzistantaj entreprenoj, reduktis investon kaj solvis malfacilon de manko de laborfortoj kaj ekipaĵoj, sed ankaŭ akcelis la disvolviĝon de industrio de gubernioj kaj komunumoj kaj pliraiciis la dislokiĝon de fabrikoj de la tuta subprovinco. En la lastaj jaroj, per tiaj metodoj la subprovinco rapide konstruis nombron da fa-

brikoj de agrikulturaj maŝinoj, kemisterko, fero kaj ŝtalo kun malmulta investo.

Reto de fabrikado kaj riparado de agrikulturaj maŝinoj

En iu ekspozicio de la urbo Vejfang mi vidis multajn traktorojn, dizelojn, elektrajn motorojn, olepremiilojn, kamionojn, ŝovelmaŝinojn, buldozojn kaj diversajn traktorotrenajn agrikulturilojn inkluzive de plugiloj, erpiloj, trenĉaroj, semiloj, rikoltiloj k. a. Plejparto de la agrikulturiloj estas fabrikita de la gubernioj de la subprovinco. Dum vizitado al iuj gubernioj mi informiĝis, ke ĉiuj gubernioj fondis agrikulturilan fabrikan, kaj komunumoj kaj brigadoj riparejon aŭ riparan grupon de agrikulturiloj, kiuj produktas traktorotrenajn agrikulturilojn krom riparado de traktoroj kaj dizeloj kaj ludas ĉiam pli grandan rolon en efektivigado de agrikultura meĥanizado. Kaj Gaŭmi-gubernio estas bona ekzemplo en tio.

En la industria konstruado, tiu gubernio unue funkciigis fabrikojn por servi al agrikulturo kaj bone fari riparadon de agrikulturaj maŝinoj. Ne nur la gubernio fondis fabrikan kaj riparejon de agrikulturiloj, fabrikojn de dizelaj akcesorajoj, lagroj, metalajoj, kemia sterko, fosfora sterko, insekticidoj kaj kaŭĉukaĵoj, sed ankaŭ ĉiuj komunumoj fondis fabriketon por fabriki kaj ripari agrikulturilojn, fabriketojn de kemia sterko, insekticido, betono, tegoloj kaj brikoj kaj gruzo, kiuj en la lastaj jaroj multe akcelis agrikulturan meĥanizadon kaj fundamentan konstruadon de kampoj de la tuta gubernio. Dum somera rikoltado de 1976 pluvadis senĉese. Por garantii draŝadon de tritiko, la koncernaj fabrikoj de la gubernio urĝe produktis pli ol 1,500 draŝilojn. En tiu aŭtuno ili produktis 404 semilojn en 45 tagoj, dank' al kiuj la 80% de la tritikaj kampoj estis semitaj per maŝinoj kaj la tempo por semado mallongiĝis je duonmonato kompare kun tiu en la pasintaj jaroj.

La agrikulturila riparejo de Ginggoŭ-komunumo de tiu gubernio estas laŭdata pro ĝia tutkora servado al agrikulturo. Ĝi ĝustatempe produktis vinĉojn, dispecigilojn, semilojn kaj ventummaŝinojn laŭ bezono de la brigadoj. Ĝi organizis 9-personan grupon, kiu tutjare riparas agrikulturi-


lojn en la brigadoj, kaj krome la riparejo ankoraŭ meminiciate kulturis teknikistojn por ili.

En la lastaj jaroj, la traktora stacio de Kang-ĝuang-komunumo akiris rimarkindan sukceson en kompletigo kaj riparado de agrikulturiloj. Laŭ la naturaj kondiĉoj de la loko kaj bezono de fundamenta konstruado de kampoj, ĝi fabrikis, post multfoja provado, kanalfosajn maŝinojn, buldozojn, grundebenigilojn kaj fosajplenigilojn. Kaj krome ĝi mem projektis kaj fabrikis kotonsemlon, kiu povas plenumi sulkofosadon, semadon, sterkadon k. a. en unu fojo. Dank' al uzado de tiuj maŝinoj multaj laborfortoj estas ŝparitaj. En la lastaj kelkaj jaroj ĝi fabrikis 17 specojn de maŝinoj trenataj de traktoroj kaj altigis la efikon de traktoroj. Krome ĝi lernis la spiriton de Daking-anoj sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj, riparis multajn malnovajn maŝinojn, mem faris maŝinpartojn kaj tujan riparadon. Dank' al tio, ĝi reduktis koston de riparado kaj ŝparis grandan kvanton da krudaj materialoj kaj pli ol 95% de ĝiaj agrikulturaj maŝinoj ĉiam estas en preteco.

* * * *

Post vizitado al la nomita subprovinco mi venis al la konkludo, ke oni plenas de memfido


koncerne al la fundamenta efektivigo de agrikultura meĥanizado en 1980. Kiel statas la tuta provinco? En Ginan, la ĉefurbo de la provinco, mi iom informiĝis pri tio. En la jaro 1965 la provinco ankoraŭ ne povis produkti traktoron kaj la produktokvantoj de irigaciaj ekipaĵoj kaj sinteza amonio estis tre malmultaj, kio malhelpis progreson de agrikulturo. De 1970, laŭ la instrukcio de la Centra Komitato de la Partio, la Partia Komitato de Ŝandong-provinco rapidigis siajn paŝojn de agrikultura meĥanizado. Nun en la tuta provinco estas 17 traktoraj fabrikoj kun jara produktivo de 30,000 traktoroj, ĝia jara produktivo de dizeloj atingis 2,500,000 ĉevalpovojn, kaj la subprovincoj, gubernioj kaj multaj komunumoj povas produkti diversajn kompletigajn agrikulturilojn. Krom la grandaj kaj mezaj kemisterkaj fabrikoj konstruitaj de la ŝtato, la gubernioj fondis malgrandajn kemisterkajn fabrikojn. Nun la ĉevalpovoj de la motoroj por agrikulturiloj de la tuta provinco estas 11-oblo de tiuj de 1965; 42% de la kampoj estas maŝinplugitaj kaj 54% de la kampoj estas maŝinirigaciataj; al ĉiu muo da kampo oni uzas meznombro 30 kilogramojn da kemia sterko. Nun la popolo de Ŝandong-provinco kun plena memfido klopodas por efektivigi fundamente agrikulturan meĥanizadon en 1980.



Jantaj-subprovinco pli-rapidigas meĥanizadon de fiŝado. Jen angulo de la prospera Jantaj-haveno.

HONG HUSI:

Por meĥanizi agrikulturon



Lang Hianping laboras absorbite.

ĈINIO decidis efektiviĝi fundamentan meĥanizon de sia agrikulturo en 1980. Por atingi tiun grandiozan celon, estas grave produkti multajn bonkvalitajn dizelojn, uzatajn kiel motoroj de aŭtoj, traktoroj, pumpiloj kaj aliaj maŝinoj. La Vejfang-a Motora Fabriko de Ŝandong-provinco prezentis bonan ekzemplon en tio.

La agrikultura meĥanizado de Ĉangvej-subprovinco iris rapide, ĉar tie konstruiĝis multaj novaj fabrikoj bezonataj de agrikulturo, kaj konsiderindan rolon ludis ankaŭ la Vejfang-a Motora Fabriko, fondita en la komenca periodo post la Liberiĝo per investaĵoj de la ŝtato. 45 procentoj de la pli ol 20,000 dizeloj produktitaj en tiu subprovinco estas faritaj de tiu fabriko. En la Ŝandong-a Kunveno pri Lerno de Daking en Industrio okazigita en la komenco de la pasinta jaro, tiu fabriko estis elektita kiel avangarda unuo en lernado de Daking.

La nomita fabriko estis finkonstruita kaj komencis produkti dizelojn en la jaro 1956, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong en 1955 pri fundamenta meĥanizo de la tutlanda agrikulturo en 25 jaroj. Antaŭ 1970, ĉiujare tiu fabriko produktis 2,000 dizelojn ĉefe de 8 aŭ 12 ĉevalpovo kaj faris sian kontribuon al la produktado de la disvolviĝantaj popolaj komunumoj.

Sekve de vigla disvolviĝo de agrikulturo kaj industrio de agrikulturaj maŝinoj inkluzive de fondo de fabrikoj de agrikulturaj aŭtoj kaj grandaj traktoroj, aperis la bezono de produktado de grandfortaj dizeloj. Kaj laŭ unueca aranĝo de la ŝtato tiu fabriko akceptis la taskon plenumi tiun bezonon, krom daŭrigo de la antaŭa produktado.

Kvankam ĝi produktadis dizelojn dum multaj jaroj, tamen mankis al ĝi pretaj projektoj de grandforta kaj malpeza dizelo taŭga por loka uzado. Kaj krome, oni devis levi la jaran produktokvanton ĝis 10,000! La gvidantoj de la fabriko decidis solvi la malfacilojn per la saĝo de laboristoj de la fabriko, kaj tiel la fabriko ne nur ŝparos homfortojn kaj monon por la ŝtato en konstruado de novaj fabrikoj, sed ankaŭ plenumos la urĝan bezonon.

Por glate fari provan produkton, la fabriko fondis specialan grupon konsistantan el gvidantaj kadroj, teknikistoj kaj laboristoj, estratan de Inĝeniero Ŝi Guanĉi, vicestro de la revolucia komitato de la fabriko. Li faris projektadon kune kun la kamaradoj de la grupo. Laboristo Ĝang Venzuo, kiu respondecis pri farado de lignaj modeloj, laboris en postlaboraj horoj por rapidigi la provan produktadon, kaj apenaŭ pretiĝis la projektoj, li jam elfaris la modelojn. Kaj frataj unuoj, kiel la Ŝanhaja Instituto de Dizelo kaj la

Motora Fabriko de Interna Mongolio, sendis al ĝi helpantojn. Ĝi finis la provan produktadon de 50-ĉevalpova dizelo en 43 tagoj kaj produktis 3,900 tiajn motorojn en 1975.


Samtempe kun tio, la fabriko faris reformadon kaj renovigadon al la malnovaj ekipaĵoj kaj teknologio, sub financa helpo de la ŝtato, por ke la ekipaĵoj kontentigu la bezonon de la disvolvigo de produktado.

En tiuj tagoj, Li Deŝeng, estro de prega grupo de la forĝa laborejo multe klopodis por mehanizi la prilaboradon de partoj de lubrikofiltrilo. Tiu veterana laboristo kun malalta klereco fine elfaris necesan ekipaĵon sub la helpo de teknikisto kaj lignajisto, kaj per tio dekkelkoble altigis la produktivon kaj moderigis la intensecon de laboro. Kaj poste, Li Deŝeng kaj la aliaj laboristoj

de la grupo faris 15 teknikajn renovigojn, ĉiu el kiuj altigis produktivon je 3-oblo ĝis 15-oblo.

Iu laboristo Ĉen Jonghiang de la fanda laborejo estas kromnomata "sturmulo" en produktado.

Laborante ĉe la fandforno, Ĉen Jonghiang ofte rememoras pri sia vivo antaŭ pli ol 20 jaroj, kiam li plugis pelante bovon, portadis akvon per site-loj kaj vekto por akvumi plantojn kaj falĉadis. Kiel la kamparanoj deziris havi maŝinojn por plenumi la laborojn anstataŭ la manoj. Nun vidante la eblecon de efektiviĝo de sia deziro, li laboris multe pli energie. De multaj jaroj, Ĉen Jonghiang laboregis ŝvitante en la varmega laborejo kune kun aliaj kamaradoj, kaj levis la produktokvanton tagon post tago. Ili pliiĝis la ĉiutagan fandan kvanton de 6 tunoj ĝis 30 tunoj



Laboristoj de la Veĵfang-a Motora Fabriko muntas dizelojn.

da fero kaj plene kontentigis la bezonon de produkto de pli multe da dizeloj.

En la dua laborejo troviĝas laborgrupo de 19 junulinoj, kiuj ĉiuj diligente lernas teknikajn sciojn kaj sin ekzercadas por lertiĝi en laboro. Ili utiligis ĉiun sekundon por multe fari kaj en 5 jaroj plenumis laborkvanton por 8 jaroj. Nun tiu grupo jam estas plenumanta taskon por 1980 kaj la grupestrino Lang Hianping estas plenumanta laboron por 1981. En majo de la pasinta jaro, Lang Hianping ĉeestis, kiel reprezentanto de tiu avangarda grupo, la Tutlandan Konferencon pri Lerno de Daking en Industrio kaj estis akceptita de Prezidanto Hua Guofeng.

Dank' al strebado de la amasoj, tiu fabriko sukcese faris pli ol mil teknikajn renovigojn. Interalie, oni faris 153 diversajn ekipaĵojn, kiuj konsistigas 30 procentojn de la totalo, konstruis 12 laborliniojn kaj fundamente efektivigis aŭtomatan produktadon de kamsaftoj. Dank' al fervora laboro de la laboristoj, la fabriko jam havas sufiĉajn ekipaĵojn por produkti 10,000 dizelojn en ĉiu jaro. En la unuaj 10 monatoj de 1976 ĝi produktis pli ol 8,000 dizelojn 50-ĉevalpovajn. Ĝi ne nur altigis la kvaliton de siaj produktaĵoj, sed ankaŭ malgrandigis la produktokoston je 21 procentoj.


De la jaro 1975, la fabriko faris plurajn provojn por uzi la 50-ĉevalpovan dizelon kiel motoron de diversaj maŝinoj. Oni faris necesan refor-

mon al ĝi kaj sukcese aplikis ĝin al 30-kilovata kaj 40-kilovata generatoroj kaj pumpiloj, tiamaniere la dizelo povas pli bone konvenigi sin al la bezono de agrikultura produktado de tiu loko.

Kaj krome, la Vejfang-a Motora Fabriko aktive helpas la popolajn komunumojn en kulturado de teknikistoj, por ke kamparanoj povu mem manipuli kaj ripari dizelojn. En ĉiu jaro, ĝi akceptas pli ol cent kamparanojn kaj ilin instruas per elektitaj lertaj laboristoj.

En la agrikulturaj okupoplenaj sezonoj, la fabriko sendas rondirajn grupojn konsistantajn el teknikistoj kaj laboristoj por instrui teknikon kaj helpi produktajn taĉmentojn, kiuj ne havas sufiĉe da teknikaj laborantoj, en riparado de dizeloj kaj aliaj agrikulturaj maŝinoj. Tiu aranĝo tre plaĉas al la kamparanoj.

La motora fabriko faris sian kontribuon al vigla disvolvado de la industriaj entreprenoj de komunumoj kaj brigadoj en Ĉangvej-subprovinco, helpante dekelkajn produktajn brigadojn en fondo de riparejoj kaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj. La Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Nantun-brigado kun 8 kamparanoj-teknikistoj kulturitaj de la fabriko estas fondita dank' al ĝia multflanka helpo. Nun tiu fabriketo kun 64 laboristoj ne nur povas ripari diversajn dizelojn kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn, sed ankaŭ povas produkti generatorojn kaj remorkojn.



Aŭtomata produkta linio de la fabriko

Tangŝan en rekonstruado

(Daŭrigo)

de NIA RAPORTISTO

Ne epidemioj post granda katastrofo

Ĉar la tertremo de Tangŝan okazis en varmega julio, ĉiuj timis, ke ĝin sekvos teruraj epidemioj.

Estis efektive timiga tiam la fakto, ke muŝoj grandakvante aperis en la tria tago post la tertremo. Laŭ statistiko, sur ĉiu kubmetro da rubajo ekzumis 80-150 muŝoj.

En la historio okazis multaj tragikajoj post tertremoj. Ekzemple, en la jaro 1556 granda tertremo okazis en Ŝenhi, kiu viktimitis cent mil homojn. Sed la nombro de viktimoj de epidemioj en la sekvanta jaro atingis 700,000.

En la jaro 1945, en Luanhian-gubernio situe proksima al Tangŝan, okazis tertremo de 6.3 gradoj, de kiu mortis ne tre multaj homoj. Tamen la nombro de la mortintoj de epidemioj en aŭtuno de la sekvanta jaro multe superis tiun de la viktimoj de la tertremo mem. Tiam cirkulis tie jena diro: Matene metinte alian sub teron, jam mortis mem oni la saman vesperon.

En la malnova Ĉinio tertremo kaj epidemio estis kvazaŭ ĝemeloj, sed la damaĝo kaj mizero alportitaj de la dua multe superis tiujn de la unua.

Tamen tia tragedio ne plu okazis ĉi-foje en la nova Ĉinio.

Post la granda tertremo de Tangŝan en 1976, ne nur ne okazis tie epidemioj, sed eĉ malmultiĝis oftaj malsanoj en 1977.

Post la katastrofo la Kontraŭtertrema kaj Savlabora Komandejo de Tangŝan alprenis diversajn efikajn rimedojn kontraŭ epidemioj kaj malsanoj, krom savado de homvivoj. Pli ol 20,000 kuracistoj kaj 1,200 kontraŭepidemiaj laborantoj partoprenis en tiu laboro. Oni disŝutis per aviadiloj kaj ŝprucigis per diversaj instrumentoj pli ol 460 tunojn da kontraŭepidemiaj medikamentoj. Krome diversaj vakcinoj estis injektitaj al la urbanoj en nombro de pli ol miliono da homoj/fojoj.

En la jaro 1977 plu daŭris la kontraŭepidemia laboro. Ĉu en fabrikoj kaj minejoj, aŭ en institucioj, lernejoj kaj loĝkvartaloj organizite kaj laŭplane leviĝis grandskala movado kontraŭ epidemioj kaj malsanoj. En julio kaj aŭgusto de tiu jaro, krom ŝprucigo de medikamentoj per aviadiloj, pli ol 395,000 homoj/fojoj estis mobilizitaj por forigo de rubajoj, dragado de kloakoj kaj sterilizado de lokoj, kaj la nombro de faritaj injektoj de diversaj vakcinoj atingis 988,156 homojn/fojojn. Dank' al tio en la lasta duonjaro de 1976 kaj la tuta jaro de 1977 neniam epidemio okazis en Tangŝan. La procentoj de la malsaniĝintoj de la loĝantaro de januaro ĝis aŭgusto de 1977 multe reduktiĝis kompare kun tiu de la sama periodo de 1975. La kazoj de morbito, kokluŝo kaj B-tipa encefalito malmultiĝis preskaŭ duone. En la tuta jaro troviĝis en la urbo nur unu kazo de infana paralizo.

Kamarado Han Jikin, kiu respondecas pri la kontraŭepidemia laboro, diris al mi, ke la sukceso de Tangŝan en tiu laboro rezultigis ne nur el granda atento de diversnivelaĵ gvidantoj, sed



Kontraŭ epidemioj

ankaŭ el plena mobilizo de amasoj kaj praktiko de kunagado de medicinaj laborantoj kun vastaj amasoj. Li montris, ke ĉiu hospitalo de Tangŝan havas sian kontraŭepidemian sekcion kaj ĉiuj hospitaloj sendis nombrojn da higienaj laborantoj por helpi urbanojn en la kontraŭepidemiaj laboroj.

Lernejoj post la tertremo

En la tertremo la 409 mezaj kaj elementaj lernejoj de Tangŝan kun ĉiuj siaj domoj kaj ekipaĵoj estis ruinigitaj kaj pli ol 1,500 el la pli ol 10,000 instruistoj viktimiĝis.

Tamen la heroa popolo de Tangŝan ne timis eĉ ĉielfalon. En la unua de septembro, unu monaton kaj kvar tagojn post la tertremo, la mezaj kaj elementaj lernejoj jam komencis sian novan lernojaron.

Nun en Tangŝan funkcias sume 415 mezaj kaj elementaj lernejoj kun 210,000 lernantoj.

La lernantoj lernas nun ankoraŭ en la pli ol 2,000 "kontraŭtertremaj klasĉambroj" faritaj el malpezaj materialoj. Krome en la tuta urbo estas 156 fabriketoj funkciigataj de lernejoj, kies

ĉefa tasko estas fari pupitrojn, seĝojn kaj diversajn instruajn instrumentojn.

En la lasta tagdeko de aŭgusto de 1976, unu monaton post la tertremo, la urbo jam okazigis kunvenon pri lerneja eduko. Ĝis novembro la Urba Eduka Buroo kompilis nombron da lernolibroj. Hebej-provinco kaj aliaj urboj de la lando sendis centmilojn da ekzempleroj de lernolibroj, per kiuj oni fundamente solvis la malfacilon de manko de lernolibroj por la lernantoj.

Por informiĝi pri la nuna stato de la lernejoj, mi vizitis la Tangŝan-an Unuan Mezlernejon.

La nomita lernejo fondiĝis en 1902. En sia juneco Kamarado Li Daĝaŭ, unu el la fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio, lernis en tiu lernejo.

En la tertremo disfalis la domoj kun 888 ĉambroj inkluzive de la klasĉambroj, oficĉambroj, biblioteko kun pli ol 70,000 libroj, laboratorioj kaj lerneja fabriketo, kaj 32 el la 140 instruistoj kaj aliaj laborantoj de la lernejo viktimiĝis.

Kion fari vizaĝe al la serioza natura katastrofo? Kiam okazis la tertremo, komunisto Cuj Ŝaŭzeng, unu el la ĉefaj respondeculoj de la lernejo, estis lernanta en la Tangŝan-a Urba Partia Lernejo. Post la tertremo li tuj rapidis al la lernejo anstataŭ iri savi siajn edzinon kaj infanon el ruino. Li urĝe kunvokis ĉiujn nevunditajn instruistojn kaj lernantojn al kunveno por aranĝi savlaborojn. Ili savis vunditojn kaj elfosis el la ruino pli ol dudek mil librojn kaj pli ol 50 mikroskopojn. En oktobro la lernejo jam rekomencis instruadon.

Nun la nomita lernejo kun pli ol 1,200 lernantoj de supera mezlernejo havas domojn kun pli ol 300 ĉambroj, parto el kiuj estis konstruita de la lernantoj kaj instruistoj mem. En la pasinteco multaj diplomitoj de la lernejo sukcesis iri en altajn lernejojn kaj en 1962 la sukcesintoj konsistigis 81% de la ekzamenitoj el tiu lernejo. Post la tertremo, precipe post frakaso de la kontraŭpartia "kvarpersona bando" la lernejo ankoraŭ pli atentis instruan kvaliton. Kun alta devokonscio la instruistoj zorge preparas kaj donas lecionojn kaj korektas hejmajn taskojn de la lernantoj. Pro vundiĝo kaj perdo de parto de

la instruistoj, aldoniĝis junaj instruistoj. La lernejo fondis kurson por helpi tiujn plialtigi sian instruon kvaliton. Veteranaj instruistoj laboras kiel iliaj gvidantoj kaj la kursanoj devas fari hejmajn taskojn kaj sin submeti al ekzamenoj.

La 51-jara matematika instruisto Ju Hua jam laboris en tiu lernejo preskaŭ 30 jarojn. En la tertremo liaj edzino kaj tria filino viktimiĝis kaj ankaŭ li mem vundiĝis je la piedo. Tamen kiam la lernejo rekomencis instruadon, li ĉiutage iras al la lernejo por doni lecionojn. En libera tempo li iras al la lerneja fabriketo por fari instruajn instrumentojn. Li ankaŭ laboras en la kurso de junaj instruistoj. Tiun vesperon, kiam mi venis al lia hejmo, li estis helpanta kelkajn junulojn, kiuj sin preparis por enira ekzameno de altaj lernejoj, en lerno de analiza geometrio.

Parolante pri la komenco de instruado de la lernejo Ju Hua montris, ke nesufiĉo de instruistoj kaj malalteco de instrua kvalito estas la ĉefa problemo de la lernejo. Por solvi tiun demandon la Tangŝan-a Eduka Buroo funkciigis en 1977 kursojn de matematiko, fiziko, kemio, fremdaj lingvoj k. a. kun lernotempo de du jaroj por altigi la nivelon de instruistoj.

Viglas la kultura kaj arta vivo

Antaŭ la tertremo en Tangŝan estis 6 teatraj trupoj, nome de kanto kaj danco, de moderna dramo, de pekina opero, de akrobato, de ombro-teatraĵo kaj de loka opero, kaj unu arta lernejo. En la tertremo, ili ĉiuj suferis grandan perdon, escepte de la kantodanca trupo, kiu faris prezentadon en alia loko. Mortis 254 homoj, inter kiuj estis famaj aktoroj, reĝisoroj k. a., kaj ruiĝis ĉiuj teatroj, kinejoj, biblioteko kaj kultura palaco.

Elsavitaj el ruinoj, artistoj de Tangŝan kun vundoj sur la korpo iris sur stratojn por fari prezentadon al ĈPLA-anoj, kiuj partoprenis en savlaboroj. Reveninte de alia loko, la Tangŝan-a Kantodanca Trupo povis provludi nur inter ruinoj kaj en la 15-a de aŭgusto jam komencis prezentadon por konsoli ĈPLA-anojn kaj plagitajn popolanojn. Multaj el la aktoroj devis firme spiti la doloron kaŭzitan de perdo kaj vundiĝo de siaj propraj karuloj, ludis programerojn pri veraj okazintaĵoj kaj veraj homoj aperintaj en la tertremo kaj savlaboroj, kiuj forte kortuŝis la spektantojn. Ilia prezentado donis al la pla-



Gajaj infanoj de Tangŝan

gitaj Tangŝan-aj popolanoj kuraĝon, memfidon kaj forton, ke al la lastaj aperis ekrideto unuafoje post la tertremo.

La natura katastrofo ne povis interrompi la kulturen kaj artan vivon de la Tangŝan-a popolo.

De post la tertremo ĝis septembro de 1977 jam okazis ok tuturbaj artaj festivaloj. Frue jam en decembro de 1976 okazis la unua tuturba arta festivalo. De januaro ĝis julio de 1977 la Tangŝan-a Kantodanca Trupo faris sume 81 prezentadojn en la kultura palaco, sentegmenta teatro, Kajluan-karbominejo, Tangŝan-a Fera-Ŝtala Fabriko, Doŭhe-hidroelektrujo k. a. kaj ĝia repertuaro enhavas 68 erojn. La aktoroj kaj reĝisoroj de la trupo profundigis en bazajn unuojn kaj surscenigis multajn avangardajn farojn kaj homojn aperintajn en la savlaboroj. Ili vere servigas arton al la proletaro kaj prikantas laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn.

Kiam mi vizitis Tangŝan, la Tangŝan-a Ombroteatra Trupo estis prezentanta en aliaj lokoj. La ombroteatra arto de Tangŝan jam havas historion de kelkcent jaroj. Ĝi estas tre ŝatata de la amasoj kaj tiu trupo estas multe zorgata de ĉiuj rondoĵoj de la urbo. En la tertremo multaj el la trupanoj mortis aŭ vundiĝis kaj granda parto de ĝiaj ekipaĵoj difektiĝis. Laŭ antaŭe difinita plano la trupo devis iri al Kantono kaj prezenti por la

baldaŭ okazonta Aŭtuna Foiro de Ekstera Komercado. Ĉu iri nun al Kantono post la forta tertremo laŭ la difinita plano aŭ ne? Sub la zorgo de la Centra Komitato de la Partio kaj helpo de ĈPLA kaj la popolo de la tuta lando, ĉiuj membroj de la teatra trupo unuanime decidis iri laŭ la difinita plano malgraŭ la okazinta katastrofo, kiu tuŝis ĉiujn. Ilia batala spirito spiti ĉiujn malfacilojn kaj ilia alta devkonscio pri laboro forte kortuŝis la gvidantojn. Fine 40 membroj de la trupo iris al Kantono kaj faris tie 30 prezentadojn en tempodaŭro de unu monato por la foiro. Pli ol 7,000 fremdlandaj gastoj rigardis iliajn prezentadojn kaj alte taksis ilian arton.

La 6 teatraj trupoj de Tangŝan ne nur rekomencis prezentadon, sed ankaŭ ricevis novajn aktorojn. En la 1-a de oktobro de 1976 ankaŭ la arta lernejo rekomencis funkcii. La lernantoj de ĝiaj danca kaj akrobata klasoj jam finis siajn kursojn kaj praktikis sian arton respektive en koncernaj trupoj. Nun en la lernejo iras kursoj de pekina opero kaj baletoj, kaj la instruistoj kaj lernantoj instruas kaj lernas ankoraŭ pli konscie, pli firme kaj pli entuziasme.

Pompe prosperas nun diversaj floroj en la kultura kaj arta ĝardeno de Tangŝan.

(Fino)



Lernantinoj de la Tangŝan-a Unua Mezlernejo



Gu Jucaj

Eburoskulptisto

Gu Jucaj

GU Jucaj estas skulptisto de la Pekina Fabriko de Eburaj Metiartaĵoj. Liaj verkoj “Heroaj Fratinetoj de la Stepo” kaj “Paŝtado de Cervoj” estis montritaj en nia Tutlanda Ekspozicio de Metiartaĵoj kaj la Kantona Foiro. Tiuj artaĵoj rikoltis multajn laŭdojn de la rigardantoj pro siaj delikateco kaj viveco.

Gu Jucaj estas lerta en skulptado de homaj vizaĝoj kaj povas formi ridmienen de figuro per simpla tranĉo. Li povas fari projektojn de artaĵoj, desegni, direkti novulojn kaj ankaŭ skulpti florojn, birdojn kaj insektojn. Por rafinisman teknikon, li zorge kolektis, en la pasintaj pli ol 20 jaroj, grandan kvanton da specimenoj de insektoj kaj plantoj, bildoj, albumoj de pentraĵoj, novjaraj bildoj, rakontaj bildserioj, poŝtmarkoj, komercaj markoj kaj bombonaj volvpaperetoj. Vidinte tion oni nature venas al la opinio, ke liaj atingoj en arto estas nenio alia ol kristalo de lia multjara diligenta laboro.

Gu Jucaj, nun 43-jara, estas unu el la unua generacio de eburaj skulptistoj kulturitaj de la nova Ĉinio. Kiam Pekino liberigis, li estis nur dekkelkjara knabo, nur iom scipovanta tajloran laboron. Iom poste, li lernis en postlaboraj horoj gravuradon de ornamaj desegnoj sur fontoplumoj kaj sigeliloj. Li aliĝis al iu kooperativo de eburaj metiartaĵoj en la jaro 1956. En 1960, la gvidantoj proponis ke li ĉesu gravuri sur eburajoj kaj komencu lerni skulptadon de tridimensiaj objektoj kaj li devis multe klopodi por venki la grandajn malfacilojn en akiro de tiu tekniko.

Gu Jucaj lernis nur 4 jarojn en elementa lernejo kaj neniam studis belarton, kaj ebura skulptado estis tute fremda por li. En la komenco li eĉ ne havis la kuraĝon fari ĉizon. Sed vidinte ke eburaj metiartaĵoj faritaj de spertaj artistoj estis eksportitaj vaste en la mondo, li tre enviis la majstrojn. Li firme decidis diligente lerni kaj disvolvi tiun tradician arton de la patrolando.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, li iris al multaj homoj por ilin konsulti pri tekniko, ĉu en frosta vintro aŭ en varmega somero, ĉu en tago aŭ en nokto. Se li trovis ies lernindan kreaĵon, li ĝin pentris aŭ faris gipsan kopion en postlabora horo. Post laboro, li atente observis vizaĝojn de preterpasantoj kun karakterizaj trajtoj, pririgardis specimenojn de varoj en montrofenestroj, rigardis fotojn en fotostudioj, bildojn en libroj kaj poŝtmarkojn en filatela vendejo. . . kaj se li trovis ke iuj el ili enhavas utilajn bildojn, li faris kopiojn aŭ aĉetis ilin por konsulto. Li vivis ŝpareme por aĉeti belartajn materialojn per ĉiu akirebla cendo. Nun li konservas pli ol 200 albumojn de pentraĵoj, pli ol 300 novjarajn bildojn, pli ol 2,000 bildojn, pli ol 2,000 poŝtmarkojn, pli ol 1,000 rakontajn bildseriojn kaj sen nombrajn malgrandajn bildojn. La malgranda ĉambro de Gu Jucaj estas plenigita per belartaj materialoj.

Gu Jucaj ofte diris, ke la arto fontas de la vivo, kaj se nur oni estas lernema, ĉie li povas trovi lernindaĵon. Por fari pli versimilajn skulptaĵojn, li ofte kolektis specimenojn de insektoj



Virinoj

en ferioj kaj postlaboraj horoj. Inter liaj specimenoj sin trovas ne nur papilioj, libeloj, griloj, mantoj, cikadoj, vaspoj kaj aliaj insektoj, sed ankaŭ bestetoj inkluzive de serpentoj kaj ranoj kiuj nombriĝas pli ol cent specojn. Aĉetante krabojn, oni kutime elektas por si grandajn, sed li preferas malgrandajn, groteskajn, kaj li tenas ĉe si tri specojn de rivera krabo, mara krabo kaj krabo kun groteskaj formoj. Foje por kapti sendifektan cikadon, li faris longan observadon kaj rimarkis, ke la cikadoj kutime rampas el la tero kaj elŝeliĝas en frua mateno. Li do iris en arbaron je la 2-a horo nokte por kapti cikadojn. Li serioze observas la kolektitajn materialojn kaj diligente lernas por atingi altan nivelon de la arto.


Ĝu Jucaj komprenas, ke oni devas diligente sin ekzercadi por posedi skulptarton, kaj por ekzercado oni bezonas tempon. Nokte, kiam liaj familianoj endormiĝis, li desegnas kaj skulptadas korektante siajn erarojn laŭ la materialoj, ofte ĝis tre malfrua horo. En somero, la familianoj enlitiĝas malfrue, li do faradas ekzercon ekde la 3-a horo en frua mateno por ne ĝeni la dormantajn familianojn.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" terure subfosis la metiartan laboron, en lia fabriko cirkulis la diro ke metiarto estas senutila. Iu diris al Ĝu Jucaj: "Senuti-

laj estas viaj skulptaĵoj, prefere ĉesu tion fari." Sed li pensis, ke tiu arto estas unu el la tradiciaj artoj de nia patrolando, kaj per metiartaĵoj oni povas riĉigi la liston de eksportaĵoj kaj glorigi la patrolandon, kaj ke tia opinio estas absurda. Malgraŭ kalumnioj de la "kvarpersona bando" pri studo de produkta tekniko, li persistis en sia laboro kaj studado de metiarto. Sub la venena influo de la "kvarpersona bando", iuj el la valoraj konsultaj materialoj perdiĝis aŭ detruigis, kio tre dolorigis Ĝu Jucaj. Foje li informiĝis, ke valoraj vitraj negativoj pri tradiciaj eburaj metiartaĵoj faritaj de iu maljuna forpasinta skulptisto estis ĵetitaj en rubaĵujon, li tuj iris por serĉi kaj fine reprenis ilin. Iuj el ili disrompiĝis. Ĝu Jucaj zorge rekunigis la fragmentojn kaj faris plurajn kopiojn kaj tiamaniere konservis la fruktojn kreitajn de la artisto per diligenta laboro.

Ĝu Jucaj faris multajn eminentajn eburajn skulptaĵojn kaj samtempe ankaŭ konservis grandan kvanton da valoraj materialoj. Li elkulturis nemalmultajn metilernantojn, el kiuj iuj jam fariĝis lertuloj en ebura skulptado. Li volonte disponigas siajn konservatajn materialojn al la fabriko kaj eĉ oferis rarajn materialojn al ĝi, kio ludis gravan rolon en konservo kaj disvolvo de la tradicia tekniko. Nun la laboristoj de la fabriko lernas la revolucionan spiriton de Ĝu Jucaj kaj fervore studas teknikon.


La pitoreska Gujlin kun nova belo




Diecaj-monto


La urbo Gujlin kun belaj pejzaĝoj aparte ĉarmas hodiaŭ. Ĝi estas reformita laŭplane en disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj starigis belajn ekskursejojn unu post alia. La urbo nun prenas al si tute novan aspekton. Apud la lagoj Jonghu kaj Sanhu en ĝia centro konstruiĝis hoteloj por eksterlandaj gastoj kaj la biblioteko, popola kunveno kaj teatro. En la verdaĵoj ĉe la piedo de la monteto Duiufeng elrigardas novaj domoj. Sur la okcidenta bordo de Ligiang-rivero aperis larĝa vojo borderita ambaŭflanke de palmoj. En Kihing-parko sur ĝia orienta bordo, persikarboj, bambuaroj, kamelioj kaj jasmenoj formas buntan bildon, kaj kiam floras osmantoj, la parko plenas je akra bonodoro. En printempo, la urbo fariĝas ankoraŭ pli alloga.

La nova fervoja stacio






Nova kvartalo






Kihing-paiko

Putuo-monto



Duhiufeng



HIAŬ MING:

La aŭtovoja trafiko de Ĉinio




PAROLANTE pri la aŭtovoja trafiko de la malnova Ĉinio, fremdlandaj amikoj, kiuj konas la tiaman Ĉinion, tuj vidas bildon de la trafikaj linioj similan al velkinta arbo kun malmultaj branĉoj. Tiam en la tuta lando estis nur 75,000 kilometroj da aŭtovojoj funkciantaj. 106 en la 179 gubernioj de Siĉuan-provinco kun plej multa loĝantaro ne havis aŭtovojon. Nun la stato tute aliĝis. La pli ol 2,300 gubernioj kaj hoŝooj de la tuta lando, escepte de malmultaj, havas aŭtan trafikadon, ĉ. 90% de la komunumoj estas ligitaj per aŭtovojoj, kaj multaj montvilaĝoj, en kiuj neniam vidiĝis aŭto, nun disponas aŭtotrafikon. La iongeco de la funkciantaj aŭtovojoj en 1976 kreskis dekkelkoble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo, la kvantoj de la transportitaj varoj kaj pasaĝeroj plimultiĝis respektive je 76-oblo kaj je 59-oblo kompare kun tiuj de la ko-

menca periodo post la Liberiĝo, kaj kompare kun tiuj de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio ili plimultiĝis respektive je 93% kaj je 150%.

En disvolvado de trafiko, la nova Ĉinio aparte zorgas pri transportado de la montregionoj kaj landlimaj nacimalplimultaj regionoj, kiuj konsistigas pli ol du trionojn de la teritorio de nia lando.

Frue en 1950, kiam la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj laborantoj estis enirantaj Tibeton, Prezidanto Maŭ alvokis al ili: "Kaj marŝu antaŭen kaj konstruu vojon". Tiam la trupoj komencis mezuri, projekti kaj prepari por konstruado de la aŭtovojo de Ĉengdu en Siĉuan-provinco al Lasao en Tibeto. La vojo 2,409 kilometrojn longa transiras Erlang, Kjuer kaj aliajn 14 montojn, Dadu-riveron, Ginŝa-riveron kaj aliajn

La 25-an de decembro 1954 okazis kunveno en Lasao por celebri la malfermiĝon de la Siĉuan-Tibeta kaj Kinghaj-Tibeta Ŝoseoj al trafiko.



Soldatoj siatempe konstruis la Siĉuan-Tibetan Ŝoseon.



dekelkajn riverojn kaj trapasas stepojn kaj primitivajn arbarojn. Malgraŭ frosto de 20-30 gradoj sub nulo, la aŭtojoj-konstruaj armeanoj kaj popolanoj peneme luktis kvin jarojn sur montoj kun alteco de 4,000 ĝis 5,000 metroj super la mara nivelo, kaj la ŝoseo estis finkonstruita en novembro de 1954. Tio estas senprecedenca atingo en la historio de aŭtovoja konstruado de nia lando.

Dum la konstruado de la Siĉuan-Tibeta Aŭtovojo, konstruiĝis ankaŭ la Kinghaj-Tibeta Aŭtovojo, kiu longas je 2,100 kilometroj kaj interligas Lasaon kaj Hining de la norda najbara Kinghaj-provinco. Pli poste oni konstruis ankaŭ la Hingiang-Tibetan Aŭtovojon kaj Junnan-

Tibetan Aŭtovojon. Dank' al tio, multe pliboniĝis la malfacila trafiko de nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio.

Dum la granda kultura revolucio, niaj ŝosekonstruistoj konstruis trunkajn ŝoseojn por nacidefendo kaj ekonomio. Samtempe la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj mobilizis la amasojn por disvolvi la trafikajn aferojn de sia loko sinapogante sur propraj fortoj. Ekzemple Gansu-provinco havis nur tre mizeran ŝosean trafikon en la pasinteco, sed nun ĉiuj komunumoj de la provinco jam havas aŭtovojon.

Post la Liberiĝo, kun la senĉesa pliboniĝo de la trafiko en la provincoj Junnan, Gujĝoŭ kaj Siĉuan de sudokcidenta Ĉinio, nove konstruiĝis nombroj da fabrikoj kaj minejoj, kaj tie formiĝis multaj mezaj kaj malgrandaj urboj kun kelkdek mil ĝis kelkcent mil loĝantoj. Antaŭ la Liberiĝo, Dujun, la ĉefurbo de la Buĵi-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de suda Gujĝoŭ-provinco en Miaŭling-montregiono, havis nur malmultajn metiejojn. Post la Liberiĝo, ĝi jam fariĝis trafika centro de la tuta subprovinco kaj unu el la industriaj urboj de Gujĝoŭ-provinco; ĝi havas pli ol 150 industriajn entreprenojn de elektro, metalurgio, karbo, ilmaŝinoj, kemiaĵoj, tekstilo, papero, led, elektroniko, manĝaĵoj ktp., kaj ĝia loĝantaro plimultiĝis de malpli ol 10,000 ĝis 140,000. En la Liangŝan-a Ji-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de suda Siĉuan-provinco kaj la Aba-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco en norda Siĉuan ne estis ŝoseo antaŭ la Liberiĝo, nun ĉiuj

iliaj gubernioj kaj plejparto de la komunumoj estas jam atingeblaj per aŭto.

Aŭtoj ne nur portis al kamparanoj de montvilaĝoj agrikulturajn maŝinojn, kemisterkon kaj insekticidon k. a., liberigis ilin de portado per la ŝultroj, sed ankaŭ malaltigis la prezojn de industriaĵoj, kaj per tio altigis la vivnivelon de la popolo. Pro uzado de kamionoj en Ĝongdian-altebenaĵo de Junnan-provinco kaj la Aba-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco de Siĉuan-provinco, la transporta kosto malaltiĝis je kvar kvinonoj kaj la prezoj de ĉiutagaj bezonaĵoj malaltiĝis je 20% ĝis 60%.

La pliboniĝo de transporto rapidigis la distribuadon de ĵurnaloj, gazetoj kaj faciligis al filmuludaj grupoj kaj ensembloj viziton al montvilaĝoj kaj sekve vigliĝis la kultura vivo de la montregionoj.


En nia lando troviĝas multaj grandaj kaj malgrandaj riveroj, el kiuj pli ol 5,000 havas bason respektive kun areo de pli ol 100 kvadrataj kilometroj. En la pasinteco multaj ŝoseoj estis barataj de riveroj. Nun, super la grandaj kaj malgrandaj riveroj oni instalas pontojn, kaj tio garantias glatan trafikadon.

La pontkonstruado de nia lando havas longan historion. En Hebej-provinco troviĝas la Ĝaŭ-

ĝoŭ-a Ponto finkonstruita en la jaro 605 p. K. kun spano de 37.37 metroj. Ĝi estas la plej frua malplenventra ŝtona arkponto de la mondo. Originala estas ĝia strukturo kaj eleganta estas ĝia formo. Ĝi estas bone konservita kaj ankoraŭ uzebla.

Post la Liberiĝo, nia lando vaste aplikis kaj disvolvis la konstruan arton de ŝtona arkponto. En 1959, oni masonis pontegon el grandaj ŝtonpecoj inter la Pagoda Monto kaj Kingliangmonto en la revolucia urbo Jan-an. Ĝi estas malplenventra arkponto je pli ol 100 metroj longa kaj kun 30-metraĵ spanoj kaj povas tralasi paralele du vicojn da aŭtoj. En Siĉuan-provinco troviĝas Ĝiuhigoŭ-ponto kun sola spano de 116 metroj. Ĝi estas ŝtona arkponto de nia lando kun plej larĝa spano.

En 1964, heredante kaj disvolvante nian bonan tradicion en konstruado de ŝtonaj arkpontoj kaj alprenante la avangardan teknikon de ferbetona ponto el antaŭfaritaj partoj, la pontokonstruistoj de Vuhi-gubernio de Ĝiangsu-provinco sukcese konstruis duoblearkan ponton. Tia ponto bezonas malmultan materialon, estas fortika kaj malmultekoste kaj facile konstruebla. Ĝi estas unu el la ĉefaj formoj de aŭtovoĵaj pontoj de nia lando.



Ponto super Ĝuĝiang-rivero en Vuĝoŭ de Guanghi

Vulonggiang-ponto sur la malsupra parto de Vulong-rivero en Fugian-provinco estas unu el niaj plej grandaj pontoj de T-straba rigida strukturo el betono armita per antaŭstreĉitaj ferstangoj. Ĝi longas 552 metrojn, havas tri ĉefajn spanojn de 144 metroj. Ĝi povas tralasi tri aŭtojn paralele veturantajn. En konstruado de ĝia supra parto, oni kunigis la antaŭfabrikitajn ferbetonajn partojn kun la helpo de longbraka gruo, sen bezono de skafaldoj inter la pilieroj. Tiu metodo taŭgas por pontokonstruado en profundaj ravinoj kun rapida torento kaj rivero de intensa navigado. Sinapogante sur la propraj fortoj en projektado kaj konstruado kaj uzante materialojn kaj instalaĵojn fabrikitajn de nia lando, la pontokonstruaj teknikistoj kaj laboristoj posedis tiun konstruan teknikon post klopodado de kelkaj jaroj, kaj finkonstruis unu post alia Gianhe-ponton de Giangsu-provinco, Ŝimian-ponton de Siĉuan-provinco, Liugiang-ponton de Guanghi, Ginggaŝan-ponton de Gianghi-provinco k.a.

Post la fondiĝo de la popola respubliko, diversaj lokoj konstruis laŭ siaj kondiĉoj multajn pontojn de alispecaj strukturoj, kiel ekzemple fertrusajn pontojn, ferajn arkpontojn k.a. per kiuj multaj ŝoseoj transpasis valojn kaj riverojn.

La ŝoseflegistoj laboras jaron post jaro sur la aŭtovojoj. En serenaj tagoj ili kolektas kaj preparas sablon kaj gruzojn, riparas kaj ordigas vojsurfacon kaj en pluvaj tagoj ili observas

akvan malutilon, forigas terfalaĵojn kaj dragas la vojrandajn fosajojn, en neĝstormaj tagoj ili balaas neĝon de sur la ŝoseo kaj ŝutas sur ĝin kontraŭglitaĵojn. Ilia diligenta laborado garantias facilan veturadon.

Tra ripeta provado ŝoseflegistoj, ŝosekonstruaj laboristoj kaj teknikistoj sukcese pavimis ŝose-surfacon per malrapide koaguliĝa likva petrolbitumo, kiu enhavas kompare multe da parafino. La asfaltita vojo povas malaltigi la konsuman kvanton de oleo, longigi la uzeblecon de pneŭmatikoj, ŝpari laborforton de ŝoseflegistoj kaj plibonigi veturan kondiĉon. La trunkaj vojoj de Pekino al diversaj provincoj plejparte estas asfaltitaj.

La ŝoseflegistoj kaj amasoj loĝantaj apud la aŭtovojoj aktive plantis arbojn ambaŭflanke de ŝoseoj. Nun pli ol 70% de la ĉefaj trunkaj aŭtovojoj de nia lando estas borderitaj per arbaraj zonoj. Ambaŭflanke de la trunkaj aŭtovojoj kaj eĉ ŝoseoj de gubernioj kaj komunumoj de Henan-provinco de centra Ĉinio estas plantitaj arbovicoj.

Nun la trafika fako de nia lando faras projekton pri ŝosea konstruado. Dum pliigo de la aŭtovojoj, la normo de la trunkaj linioj estas iom post iom altigita por kontentigi la bezonon de la socialismaj revolucio kaj konstruado kaj por ke la vojaĝantoj veturu pli facile kaj komforte.



Ŝoseo de Kajli

Kanto de la Juneco

(Elektitaj ĉapitroj de la romano)

(Daŭrigo)

Resumo de la antaŭaj ĉapitroj: *Lin Botang, la patro de Lin Daŭging estis granda bienulo loĝanta en Bejping. Foje kiam li kolektis terrenton en kamparo, li vidis belan nepinon de farmulo — Hiuni, kaj perforte prenis ŝin kiel sian kromedzinon, kiu poste naskis Daŭging. Apenaŭ Daŭging atingis la aĝon de unu jaro, Hju Fengjing, la unua edzino de Lin Botang, forpelis Hiuni el la domo. Hiuni preskaŭ freneziĝis, ne volante disiĝi de sia kara filineto. Lin Botang do perforte resendis ŝin al ŝia hejmvilaĝo. En la nokto post ŝia reveno al la hejmo, ŝi sin dronigis en rivero. — Pri ĉio ĉi tio Lin Daŭging informiĝis de onklino Vang, servistino de Lin Botang, antaŭ sia forlaso de la hejmo.*

Iom post iom Daŭging kreskis en sia patra domo sub humiligo kaj turmentado. Vidante ke Daŭging estas bela, Lin Botang kaj lia edzino pensis: Se ŝi estos iom klerigita, ŝi facile ricevos riĉan kaj potencan edzon, kaj tio certe estos profitdona por ili. Estis do decidite, ke ŝi vizitu mezlernejon. Ĝuste kiam ŝi estis baldaŭ fariĝonta abituriento, Lin Botang bankrotis, kaj Hju Fengjing intencis edzinigi Daŭging al kuomintanga ŝtatoficisto Hu Meng-an. Tion malkonsentis Lin Daŭging kaj ekrompis kun ŝi, jurante forlasi por ĉiam la damnindan hejmon. Kun helpoj de Ĉen Vejju kaj aliaj kunlernantinoj ŝi pene finis sian studon de la du lastaj monatoj de la mezlernejo kaj submetis sin al ekzameno por eniri en Pedagogian Universitaton.

Komenciĝis la someraj ferioj. Ŝi unue loĝis tri tagojn en la hejmo de ŝia intima amikino Vang Hiaŭjan kaj poste ŝi veturis al Bejdajhe por viziti sian kuzon. Tamen ekster ŝia atendo, ŝia kuzo jam forlasis la lokon forpuŝite de Ju Gingtang, la estro de la elementa lernejo de Jangcun-vilaĝo. Ne trovinte sian kuzon, nek havante monon por reveni al Bejping, Daŭging tre ĉagreniĝis. Ju Gingtang promesis trovi por ŝi laboron kaj ŝi devis tie atendadi malpacience. En tiuj tagoj ŝi ofte iris al la marbordo. Tre bela estis la marbordo de Bejdajhe, tamen tie ŝi vidis ankaŭ ke riĉa sinjorino nutras hundidon per bovlakto kaj ĉifona virino riparas fiŝreton kun malgrasa bebo en la sino. . . Kiel ŝi povis kvietiĝi antaŭ sia persona malfeliĉo kaj la socia mallumo?

La Red.

IV

“Ho, vi revenas, fraŭlino Lin! Nia vilaĝo, tuj apud la maro, havas senkomparaĵajn pejzaĝojn, kiujn vi povas bone ĝui!” Apenaŭ Lin Daŭging revenis al la ĉambro de la templo, kie ŝi pasigis la antaŭan nokton, Ju Gingtang elpaŝis el ĝi renkonte al ŝi. Ridetis lia tuta vizaĝo, ŝajne eĉ la palpebroj, kiuj senĉese fermiĝis kaj malfermiĝis.

Antaŭ ol Daŭging respondis, li sciigis ŝin fiere: “Hodiaŭ frumatene mi jam iris al la urbo por viziti urbestron Baŭ, kiu estas juna kaj havas altan prestiĝon. Antaŭe mi studis kun li en sama lernejo. Estas bedaŭrinde, ke mi ne renkontis lin, ĉar li iris al la provinca ĉefurbo por ĉeesti kunvenon. Sed ne grave, vi povas loĝi kelkajn tagojn ĉe ni, kaj ĉio facile solviĝos kiam li revenos.”

Daŭging silentis, rigardante al la flava kaj osteca vizaĝo de Ju Gingtang. Tiu ĉi tuj klarigis:

“Estu trankvila, kaj restu ĉi tie kiel hejme. Vi ne scias, ke mi estas homo tre amikiĝema.”

“Ne estu ĝenata! Se la afero ne sukcesos, mi reiros al Bejping,” diris Daŭging. Bolis en ŝi granda malkvieto kaj konsterneco. La kuzo kaj lia edzino forestas; pri la laboro ankoraŭ ne estas definitiva respondo; reiri al Bejping ŝi ne povas pro manko de mono; krome, se ŝi sukcesus reiri al Bejping, kion ŝi tie farus? . . . Ŝi rigardis la amason da konkroj sur la tablo kaj enpensiĝis.

“Ne rigardu min kiel fremdulon, fraŭlino Lin! Kiam mi havos en la estonteco okazon iri al Bejping, ĉu mi ne same pasigos kelkan tempon ĉe vi?” Ju Gingtang diris, kun tia sincero, kvaŭzaŭ li estus ŝia intima amiko, kaj tio iom trankviligis ŝin. Post longa paŭzo, ŝi kapjesis:

“Dankojn! Se urbestro Baŭ baldaŭ revenos!”

“Certe! Baldaŭ, baldaŭ! Post nelonge! Oh, oh, pasiginte tiom da tempo ekstere, vi ankoraŭ ne tagmanĝis, ĉu ne? La manĝo estas jam preta por vi.” Li tuj vokis la pordiston: “He, maljunulo Gaŭ, portu al fraŭlino Lin la tagmanĝon!”

La maljunulo metis la manĝaĵojn sur la tablon, kaj Ju Gingtang eliris kun kurbiĝinta dorso. Lin Daŭging rigardis la patkukojn kaj frititajn ovojn, sed ŝi tute ne havis apetiton kaj nenion prenis.

Antaŭ ol ŝi forlasis Bejping, kiam ŝi loĝis ĉe Vang Hiaŭjan, ŝi petis kelkajn proksimajn samlernejaninojn kaj instruistojn serĉi por ŝi laboron. Nun pasis tuta semajno, sed ŝi ricevis neniun respondon el Bejping, kaj ankaŭ de urbestro Baŭ venis nenia novaĵo. La vortoj “Oh, oh, ne estos problemo!” de Ju Gingtang komencis ŝin tedi kaj naski en ŝi suspekton pri li.

“Oh, oh, fraŭlino Lin, estu trankvila, estu trankvila! Ne estos problemo; urbestro Baŭ baldaŭ revenos.”

“Oh, oh, permesu min demandi, ĉu vi edziniĝis, fraŭlino Lin? Ĉu vi havas fianĉon? . . . Pardonu, ke mi demandis.”

Ĉiutage Ju Gingtang venis al ŝi unu aŭ du fojojn, kaj ripetadis la samajn sengustajn gurditaĵojn.

“Kial li min restigas ĉi tie? Li diris, ke li serĉas por mi laboron; kial li atendadas tiun urbestron Baŭ? Por kio li ĉiam demandis min ĉu mi edziniĝis kaj ĉu mi havas fianĉon?” Kreskis la suspekto de Daŭging pri la agoj de Ju Gingtang, kaj ŝi volis forlasi tuj la vilaĝon. Sed, en tiu ĉi vasta mondo, ŝi tamen ne sciis kien iri. Sen alia rimedo, ŝi povis nur resti en Jangĝuang kaj toleri, kun dentoj kunpremitaj, la turmenton de tia stranga vivo.

Pasis dek tagoj. La leteroj, kiujn ŝi skribis al siaj samlernejaninoj kaj instruistoj en Bejping por peti helpon en la serĉo de laboro, estis kiel ŝtonoj ĵetitaj en la maron kaj dronintaj seneĉe oni ne scias kien. Ankaŭ ne estis novaĵo pri la reveno de la urbestro Baŭ de Ju Gingtang. La koro de Daŭging ĉiam pli peziĝis, kaj ŝia vizaĝo ĉiam pli paliĝis. Por eviti la banalajn babilaĉojn de Ju Gingtang, por pasigi la ĝenajn tagojn, ŝi restis tutan tagon sur la marbordo kaj bone amikiĝis kun la maro.

Ĉiumatene post la manĝo ŝi tuj iris al la marbordo. Rigardante la senliman lazuron kaj la blankajn velojn de solecaj boatoj, kiuj dancetis sur la akvosurfaco, ŝi sentis, ke iom sereniĝis ŝia peza koro, kvazaŭ karesata de varma manplato. La maro ĉiam plaĉis al ŝi, kvankam ŝi ne plu havis tian intereson, kian ŝi montris en la unua tago, kiam ŝi alvenis al la marbordo, ludante la buŝharmonikon, kolektante konkojn kaj promene ĝuante la pejzaĝon. Ĉu la maro estis kvieta kaj bela kiel ĉarma atlaso, ĉu ĝi bolis de ondegoj kaj hurlis kiel furioza besto, ŝi sidis tutan tagon sur granda roko trempiganta en la akvo. Ĉe la maro, ŝi sentis sin kvazaŭ ĉe sia kara patrino. En tiu momento, ŝiaj melankoliaj okuloj longtempe fiksiĝis sur la marakvo; kelkfoje ŝi klinis la kapon kaj mallaŭte vokis: "Panjo!" Post kiam ŝi aŭdis de onklino Vang pri la vivo kaj sorto de ŝia patrino, la patrina figuro ofte aperis en ŝiaj imagoj.

La kamparanoj kaj geknaboj en la ĉirkaŭaĵo miris ĉiuj pri tiu kurioza junulino, kiu, blanke vestita, sidis sur la roko tagon post tago.

Tiu ĉi silenta monotona tamen estis rompita. Iuvespere, kiam ŝi gapis al la furiozanta tajdo, iu voĉo ŝin vekis el la sonĝa revo:

"Estas tempo reiri por manĝi; maljunulo Gaŭ vin atendas."

Daŭging returnis sian kapon kaj trovis brunan kaj maldikan junulon, kiu staris apud ŝi ride-tante. En la pasintaj tagoj ŝi ofte vidis lin promenanta sur la strando ne malproksime de ŝi, sed ili neniam interŝanĝis vortojn.

Kun larĝe malfermitaj okuloj, Daŭging rigardis la junulon. Ŝi ne klare aŭdis kion li diris.

"Reiru por manĝi, kaj atentu, ke via sano ne detruigu pro malsato." La junulo ripetis al ŝi, kun afabla voĉo, kvazaŭ li estus parolanta al intima amiko. Li havis harojn kombitajn ambaŭflanken, kaj portis studentan uniformon el flava kepro. Liaj okuloj, kvankam malgrandaj, radiis spritecon kaj inteligentecon. Tia homo, malofte trovebla en la vilaĝoj, ektiris atenton de Daŭging. Sed ŝi nur ĵetis al li rigardon, respondis per "Dankon", kaj foriris.

De tiam ŝi ofte vidis la junan studenton sur la plaĝo. Kelkfoje li proksimiĝis al ŝi por paroli kun ŝi, sed, kredeble pro ŝia malvarma mieno,

Lin Daŭging ĉe marbordo



li ne malfermis sian buŝon kaj malrapide paŝis for.

Iam enuigite de la sidado sur la roko, Daŭging promenis laŭlonge de la bordo. Pli ol unu fojon ŝi iris al la naĝejo kaj preterpasis la kvazaŭparadizajn vilaojn. Iutage ŝi hazarde revidis la grizajn tendojn kaj la grandan salikon malantaŭ la roko. Tio rememorigis ŝin pri la virino riparanta reton sub la arbo kaj pri ŝia infaneto, kaj ŝi direktis sin al la tendoj.

Malaperis la virino sub la saliko. Daŭging trovis nur kelkajn fiŝkaptistojn kuirantajn ĉe kaldrono instalita ekster la tendoj, kaj ŝi demandis iun maljunulon el ili.

“Kie estas la malsana virino kiu retojn riparas?”

“Kiu?” La maljunulo surprizite turnis sian kapon al ŝi. “Ĉi tie ne estas virino. Kiun vi serĉas?”

Daŭging priskribis al li la virinon kaj ŝian skeletan bebon.

“Ve, ŝi!” La maljunulo ĉesis hejti kaj diris al Daŭging: “Ŝi ĵetis sin en la maron. . . ĉio finita! . . . Por tia homo pli bone estas morti ol suferi tian mizeron. Bedaŭrinda estas ŝia infano, bona fileto! Antaŭ malmultaj tagoj ŝi ĵetiĝis en la maron kun la infano en la brakoj. . . La tuta familio finiĝis!”

Kelkaj fiŝkaptistoj, scivolemaj, alpaŝis ĉirkaŭ Daŭging kaj miris, kial studentino interesiĝas pri tiu suferinta malriĉulino. Tio embarasis kaj ĉagrenis Daŭging, kaj ŝi kure ilin forlasis.

Ŝi iris sur la mola sablo per hastaj paŝoj.

La malgrasa kaj pala vizaĝo, la okuloj senesprimaj kiel tiuj de fiŝo, la infaneto ploranta pro malsato kaj la patrino kiu, kun haroj taŭzitaĵ, ĝemkriis “redonu al mi la infanon!”. . . ĉi tiuj figuroj, intermiksitaĵ, formis tristan bildon, kiu ŝvebis antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi sentis siajn kruojn senfortaj, sian koron premata, sed ŝi pene daŭrigis la paŝadon. Ŝi fariĝis tiel laca, ke ŝi deziregis tuj atingi sian ĉambron kaj kuŝiĝi sur la liton.

“Hej, blanka kolombeto, haltu, haltu!” bruis ie krioj kun ridoj. Daŭging levis la kapon kaj vidis, ke sur la plaĝo kuŝas aro da junaj sinjoroj,

tute nudaj. Apud ili senorde amasiĝis belaj savzonoj, elegantaj naĝvestoj, delikataj sunombreloj similaj al fungoj, kaj vinboteloj kun diverskoloraj etikedoj.

Daŭging estis timigita, sed antaŭ ol ŝi komencis foriri, kriis alia voĉo:

“Flegistino, he, venu, blanka flegistineto! Ni laciĝis, venu masaĝi niajn kruojn!”

Akompanata de ridoj, tiu ĉi krio atingis la orelojn de Daŭging. Ŝi ekkomprenis, ke la krioj kaj ŝercoj celas al ŝi, ĉar ĉi tie en la proksimeco nur ŝi estis blanke vestita kaj ne troviĝis alia virino. Tre kolerigita, ŝi subite sin rektigis kaj turniĝis rekte al tiuj sinjoroj. Ŝi haltis je dekelke da paŝoj de ili kaj, kun lipoj kunpremitaj, ilin rigardis majeste. Ŝia fiera kaj malama rigardo verŝiĝis sur ilin kvazaŭ pluvego kaj ilin silentigis. Daŭging tiel rigardadis ilin dum tuta minuto, kaj poste ŝi serioze returnis sin kaj deiris aplombe.

Apenaŭ ŝi faris kelkajn paŝojn, kiam krakis post ŝi denove ridoj.

“Senhonta!” “Kiel severaj okuloj!” “La blanka kolombeto metamorfoziĝis en vulturon!”

Daŭging ne plu returnis la kapon. Ŝi elpoŝigis la naztukon kaj decideme forviŝis la larmojn.

Kiam ŝi revenis al la rando de la vilaĝo, komencis vesperiĝi, kaj la ĉielo ekvualiĝis de nuboj. Daŭging sidiĝis laca sur la strando kaj redirektis sian rigardon al la maro, kiu, ĉarma kaj kvieta en normalaj tagoj, nun koleris kaj fariĝis nigra pro la proksimiĝo de ŝtormo. Muĝis la ondegoj, kiuj furiozis senbride kiel galopantaj ĉevaloj. La subite ŝanĝiĝanta maro ĵetis al ŝi pli da ombro sur la koron. Ŝi klinis sin flanken sur la malseketa sablo kaj rememoris la junajn sinjorojn kiujn ŝi ĵus vidis. Malrapide ŝi skribis per fingro sur la sablo:

*Antaŭ la pejzaĝo larmas mi kun trista koro.
Kiom longe povas daŭri riĉo kaj honoro?
Nun mi vidas, ke aŭtune nur sovaĝanseroj
Ĉiujare flugas super 1' akv' de Fen-rivero.*

“Ĉu estas versoj de la dinastio Tang?” Milde aŭdiĝis fervora voĉo de post ŝia dorso. Daŭging

sin turnis kaj trovis, ke tiu sama bruna kaj mal-dika junulo kliniĝas super ŝi kun rideto. “Plaĉas al vi la poezio? Ĉu vi ankaŭ verkas poemojn? La marbordo de Bejdajhe vere estas loko poezia!”

Ne sciante kiel, Daŭging ekruĝiĝis. Ŝi tuj stariĝis, deviŝis la sablerojn de sur la hararo kaj estis preta foriri, dirante mallaŭte nur: “Ne, mi ne scipovas.” Sed ĉifoje la junulo baris al ŝi la vojon kaj konsilis al ŝi: “Baldaŭ pluvos, reiru! Por kio vi restas sur la strando tutajn tagojn?”

“Nenio! Dankon!” Ŝi ne sciis, kion ŝi respondis, returnis sin kun malvarma mieno kaj forkuris.

Grandaj pecoj da nigraj nuboj, pelataj de la forta orienta vento, fluge ruliĝis sur la ĉielo. La ondoj bolegis kaj fariĝis dense malhelaj. Estis pluvegonta. Forkurinte de la junulo, Daŭging malrapidigis siajn paŝojn, kaj direktis sin al la lernejo, kiu distancis de la marbordo je preskaŭ duono da kilometro. Kiam ŝi atingis la arbareton antaŭ la lernejo, estis jam tute mallume. La pluvo falis kvazaŭ verŝita el siteloj. Ŝi rapide kuris, unuspire ĝis la lernejo. Sed kiam ŝi, enirinte la pordon de la templo, ne sukcesis trovi sian ĉambron, ŝi ekkomprenis, ke ŝi eraris en la mallumo: ŝi enkuris la templon tra la flankapordo kaj troviĝis nun en alia korto, ĉirkaŭ kiu la ĉambroj servis kiel sidejo de la vilaĝa administracio. Jam estante tie, ŝi do restis por ŝirmiĝi de la pluvo. Estis hela la orienta ĉambro, el kiu aŭdiĝis bruado de maĝango. Daŭging staris en la koridoro antaŭ ĝi, spiregis kaj viŝis sian gutantan hararon. Subite eksplodis raŭka rido de viro en la ĉambro.

“He, maljuna Ju*, kion vi celas restigante ĉi tie la etulinon? Se tiel daŭros la afero, ĉu vi ne timos, ke via edzino ĵaluzos?”

“La knabino havas vere plaĉan aspekton, kaj krome estas abiturientino. Maljuna Ju, viaj okuloj ja estas spertaj!”

Ridoj krakis en la bruado de la maĝango kaj la plaŭdo de la pluvego. Ekkuris tremo tra la korpo de Lin Daŭging, kiu staris ekster la fenestro. Sin premante al la muro, ŝi enrigardis la ĉambron tra la vitro kaj klare vidis la lernej-

estron, kiu, palpebrumante, ludis maĝangon kun tri personoj aspektantaj kiel sinjoroj. Unu el ili, dikulo, kun kolosa kapo kaj grandaj oreloj, portanta okulvitrojn en nigraj kadroj el testudaĵo, etendis la polekson al Ju Gingtang kaj diris ŝmacante per la dikaj lipoj:

“Maljuna Ju, ĉu vi bonvolas cedi al mi la knabinon? Se jes, mi rekompencos vin per mia vendejo Juhinghaŭ en la urbo . . . Jes, mi havas jam tri edzinojn, sed mi neniam spertas, kiel gustas studentino!”

Daŭging pli forte sin premis kontraŭ la muro kaj daŭre aŭskultis retenante la spiradon, kun dentoj kunpremitaj.

“Oh, oh, fratoj, ne ŝercu! Mi persone havas nenan pretendon rilate al ŝi.” Estis voĉo de Ju Gingtang, kiu diris duonŝerce kaj duonserioze. “Al vi, miaj fratoj, mi diru do la veron. Antaŭ longe guberniestro Baŭ jam petis min serĉi por li belan studentinon. Lia edzino, malbela vilaĝanino, kompreneble ne plaĉas al li. Kiam mi vidis la knabinon Lin, kiu venis viziti sian kuzon, mi trovis ŝin tute simila al rifuĝintino. Ŝia malgaja mieno ekkaptis mian kunsenton, kaj mi restigis ŝin . . .”

La ceteraj tri kunludantoj ĉesis preni bloke-tojn de maĝango kaj ĉiuj turnis sian vizaĝon al Ju Gingtang por aŭskulti lin, kiu rakontis kun granda intereso. “Bedaŭrinde, maljuna Baŭ iris al la provinca ĉefurbo por kunveno kaj ne revenis ĝis nun. La knabino urĝis min trovi por ŝi laboron. En la nuna tempo trovi laboron por virino estas tute facile; nur se ŝi havas belan aspekton, trovi ‘laboron’ estas tute facile! Ha, ha! . . .”

La dikulo tuj ekfrapis Ju Gingtang sur la ŝultron kaj diris, ridetante kun duonfermitaj okuloj:

“Se guberniestro Baŭ ŝin ne volos, vi devos ŝin cedi al mi, maljuna Ju! La herbo ne vivas pli ol unu jaron, la homo ne vivas pli ol unu vivon. Oni devas ĝui la volupton, eĉ se tio ruinigus la tutan havaĵon!”

*Laŭ la ĉina kutimo, oni metas la vorton “maljuna” antaŭ familia nomo de viro por montri intimecon.

.....

Daŭging ne sciis, kiel ŝi kuris en la pluvega nokto al sia ĉambro. En la densa mallumo, ŝi kuŝis kuntiriĝinta kvazaŭ grave vundita, sur la ligna lito, en tute malsekigita vesto. Ŝi restis tiel dum longa kaj longa momento, silente, nenion pensante.

La pluvo torentis ekster la fenestro, la ondoj terure muĝis en la maro, animskue bruis la tuta ĉielo, sed Daŭging nenion perceptis.

Iom post iom ŝi rekonsciiĝis kaj komencis rememori sian travivaĵon en la lasta duonmonato. Kial la homa vivo estas tiom senkompata kaj kruela? Per sia tuta kuraĝo ŝi ĵus sukcesis fuĝi el la malluma kaj koruptiĝinta kaĝo de familio, kiu volis ŝin sufoki. Sed ŝi ne atendis, ke ŝi falas nun en socion ankoraŭ pli malluman kaj pli koruptiĝintan, kiu malfermas sian faŭkon por ŝin engluti. Kiel povos vivi plu ĉiu perspektivohava junulo, ĉiu junulo kiu ne volas degeneri? En tiu ĉi vasta mondo, ĉu vere ne troviĝas eĉ peco da tereno por ŝirmi 18-jaran knabinon?

En la profunda nokto, kun malfacila penado ŝi eksidis sur la lito kaj lumigis la lampon. Vidiĝis sur la tablo tri leteroj. Per tremantaj fingroj ŝi malfermis la unuan, skribitan de Vang Hiaŭjan. Klare saltis al ŝiaj okuloj la jenaj vortoj:

“. . . Jen ĝojiga novaĵo: vi trapasis kun bona rezultato la ekzamenon por Pedagogia Universitato. Sed ankaŭ estas malbona novaĵo: Oni diras ke, vin ne trovante, via patrino, kiu elspezis multe da mono de Hu, sin kaŝis de li. Ĉu vi revenos al Bejping, Daŭging? Laŭ mi, ne revenu nun! . . .”

“Ne revenu nun. . .” ŝi mallaŭte ripetis.

La dua letero estis skribita de Ĉen Vejju, kiu ankaŭ multe klopodis por trovi laboron por Daŭging, sed malsukcesis. La letero diris jene:

“Kara franjo Daŭging, vere estas malfacile trovi laboron! Mi iris al multaj personoj kaj diris al ili viajn suferojn kaj aspirojn, sed multaj respondis al mi per moka voĉo; eĉ mia paĉjo min kontraŭstaris . . . Kion fari, kara franjo?

Aŭ, vi revenu, vi revenu al Bejping kaj poste ni klopodos por solvi la problemon. . .”

“Revenu al Bejping kaj poste ni klopodos por solvi la problemon?” En la malforta lamplumo, la vizaĝo de Daŭging aspektis des pli pala kaj tutkorpe ŝi tremis. Pro malsato? Pro malvarmo? Aŭ pro sinsekvo da tro pezaj batoj? Kun la du leteroj firme tenataj en la manoj, ŝi sidis kvazaŭ paralizita sur la tabureto, ne povante eĉ iom moviĝi. La tria letero restis kuŝanta sur la tablo, kaj ŝi jam ne havis kuraĝon ĝin malfermi. La vivo tiel kruele ŝin vipis, ke ŝi ne plu povas imagi ian ajn feliĉon aŭ varmon en ĝi. Eble la tria letero enhavas novaĵon pli teruran kaj pli severan?

Pluvis ĉiam pli forte. Apenaŭ ekbrilis la fulmoj sur la malhela ĉielo, kiam peza tondro eksplodis per sia surdiga bruego. En la ĉambro ekstere de tiu, en kiu Daŭging loĝis, kuŝis ĉerko deponita de riĉulo. Estis preskaŭ noktomezo. La keroseno en la lampo elĉerpiĝis. Senforte diskrevadis la eta fajra ekstremo de la meĉo. Mallumo komencis fali kaj fine vualis la tutan ĉambron. Sidante sur la tabureto, Daŭging sentis kapturton, kiel se ŝi estus ŝancelŝvebanta en la aero. Ŝi ne sciis, kion ŝi pensas; eble ŝi pensis nenion. Fulmo traboris la obskuron kaj vidigis la ĉerkon nigre lakitan. Ŝi surpriziĝis kaj vivege rekomencis bati ŝia preskaŭ haltanta koro.

“Panjo, savu vian filinon! . . .”

Plorante ŝi falis ĉe la ĉerkon, kaj silentis dum longa momento.

Kiam ŝi rekonsciiĝis, trakuris ŝin terura ideo, kiu forte kuntiris ŝian koron, sed tuj sekve ĝin skuis draste. . . Ŝi saltleviĝis kaj freneze kuris el la ĉambro.

La nokto estis dense malluma. La pluvo sin verŝis senfine. En tia malluma kaj ŝtorma nokto Lin Daŭging kuris rekte al la plaĝo.

La maro, nigra kiel ĉina inko, rulis timigajn ondojn. Sed en la okuloj de Lin Daŭging, la malluma socio estis pli timiga. Ŝi kuratingis la marbordon kaj, sen ia ajn hezito, ĵetis sin al la hurlantaj, senbridaj ondegoj.



NOVA LISTO DE SIMPLIGITAJ ĈINAJ IDEOGRAMOJ (PROJEKTO)

Post sankcio de la Ŝtata Konsilantaro, la Komitato por Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo publikigis la Duan Liston de Simpligitaj Ĉinaj Ideogramoj (projekton).

La ĉinaj ideogramoj estas komplikaj kaj multnombraj. En 1956 la Ŝtata Konsilantaro jam publikigis Projekton de Simpligitaj Ĉinaj Ideogramoj. Ĝis 1964, laŭ la Plena Listo de la Simpligitaj Ideogramoj kompilita de la Komitato por Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo, 2,238 ideogramoj estis simpligitaj. La uzado de tiuj simpligitaj ideogramoj en la lastaj 20 jaroj pruvis, ke tio donis grandan faciligon al la popolo en lernado de revolucia teorio kaj akiro de kulturo kaj scienco, kaj trovis varman akcepton de la popolo.

La nova listo konsistas el 853 simpligitaj ideogramoj en kadro de 4,500 ofte uzataj ideogramoj. Inter la 853, 148 estis jam de longe vaste uzataj de la popolo. Post la publikigo de la listo la tuta lando ekuzis ilin en libroj kaj gazetoj. La ceteraj estas uzataj ne tiel vaste kiel la antaŭaj kaj oni okazigas diversajn

kunsidojn por fari diskutojn kaj kolekti opiniojn.

NOVA ALTFORNO EN ANŜAN

En la fino de 1977 la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio konstruis altfornon la plej grandan ĝis nun en nia lando kaj ekuzis ĝin por produkti feron.

La kapacito de la altforno estas 2,580 kubmetroj kaj la jara produktokvanto de fero estos 1.5 milionoj da tunoj. La altforno estis ekprojektitata en la komenco de 1977 kaj ekkonstruata en marto. De ekprojekto ĝis produkto de fero oni uzis nur 9 monatojn; tio estas nova rekordo de konstruado de altforno en nia lando.

TRIUZA OFTALMOLOGIA LASERA KURACAPARATO

Iu hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en kunlaboro kun aliaj institucioj sukcesis fari oftalmologian laseran kuracaparaton kaj ĝin uzas nun en kliniko.

La aparato estas malgranda kaj kostas malmulte. Ĝia lumigado estas sufiĉe klara, precize celigebla kaj facile manipulebla. En hospitalo bone ekipita ĝi povas esti uzata kune kun diverstipaj korneaj mikroskopo. Ĝi ankaŭ povas esti uzata sola por truigi irison, fiksita sur simpla subportilo. Dank' al tiu aparato oni nun ne bezonas fari operacion al paciento nek enhospitaligi lin kaj aliflanke povas multe moderigi la suferojn al paciento kaj redukti la kuractempon.

FOSILIAJ FRAGMENTOJ DE PRAHOMOJ

Antaŭ kaj post la kaverno n-ro 1 ĉe Longtanŝan de la popola komunumo Daju de Kunming de Junnan-

provinco, arkeologoj trovis du fosiliajn homajn dentojn kaj grandan kvanton da fosiliaj mamuloj. Laŭ tio ke la grundo entenanta la fosiliojn estas duonaglomerita, laŭ la grado de veterdetruigo kaj fosiliigo de la plafono de la kaverno kaj laŭ la kuntrovitaj animaloj, oni povas konkludi, ke tiuj prahomoj vivis en la posta periodo de plejstoceno, nome antaŭ dekmiloj da jaroj.

Antaŭ tio oni jam trovis en aliaj kavernoj de tiu regiono fosiliojn de ostofragmentoj de homa kapo, ŝtonajn ilojn kun rimarkindaj postsignoj de frapiteco kaj fosiliojn de mamuloj.

Tiu trovo ĉe Longtanŝan havas grandan valoron en studo pri la evoluado de la homo kaj geologia historio de Kvatarnaro.





Ekspozicio de Aŭstraliaj Animal-specimenoj en Ĉinio

de VANG ZONGVEJ

LA ekspozicio okazis lastan novembro sinsekve en Pekino, Ŝanhajo, Kunming kaj Kantono. La ekspozitaĵoj multe interesis la rigardantojn. La ekspozicio markis senĉesan disvolviĝon de la amika interrilato kaj plivastiĝon de interŝanĝo de kulturo kaj scienco inter Ĉinio kaj Aŭstralio.

La faŭno de Aŭstralio havas tre karakterizajn trajtojn, tiel ke ĝi formas apartan regionon en la mondaj faŭnoj. Krom kelkaj birdoj kaj reptilioj, en la ekspozicio estis elmontrataj ĉefe mamuloj. La mamularo de Aŭstralio estas simpla en konsisto, primitiva en karaktero kaj netrovebla en aliaj mondpartoj. La animaloj sole troveblaj en Aŭstralio ampleksas 17 familiojn el 4 ordoj, el kiuj du familioj de monotremoj troviĝas nur en Aŭstralio. El la 9 familioj de marsupiuloj de la mondo Aŭstralio havas 7.

La ekspozicio montris al rigardantoj la karakterizaĵojn de la aŭstralia faŭno. Ĉe ĉiu grupo da ekspozitaĵoj

estis projektata filmo pri la vivmaniero de koncernaj animaloj. Irinte en la halon, oni trovis sin kvazaŭ en medio de bruaj arbaro kaj stepo de Aŭstralio. Tie oni vidis rapid-kurajn dromiceojn, kiuj ne povas flugi. Pro sia aparta karaktero la birdo estas adoptita kiel ŝtata simbolo. La aspekto nealtira ridbirdo (*Dacelo gigas*) povas eligi komikan ridsonon, kiun ĉiuj aŭstralianoj konas pro tio ke la Radio de Aŭstralio alprenas ĝin kiel sian signalon. Tie oni vidis ankaŭ tre faman birdon menuron, kiu povas bele danci kaj kanti.

Reptilioj estas malaltklasaj bestoj inter la vertebruloj, ekzemple sabla varano (*Varanus gouldii*), dorna diablo (*Moloch horridus*) kaj ŝindodorsa lacerto (*Trachydosaurus rugosus*). Tiuj reptilioj formas ŝtupon de la evoluado de mamuloj kaj mem estas apartaj animaloj troviĝantaj en Aŭstralio.

La du unikaj reprezentantoj de kloakuloj tre proksimaj al reptilioj

estas ekidno kaj ornitorinko, kiujn oni nomas vivaj fosilioj. Ili estas mamuloj, sed ovonaskitaj.

Marsupiuloj estas pli evoluigintaj ol la monotremoj kaj ne estas ovonaskitaj. Estas tre interese, ke femala marsupiulo havas haŭtan poŝon sur la ventro, kiu kovras la mamojn. Post naskiĝo la idoj tuj rampas en la poŝon per helpo de la antaŭaj membroj, kaj serĉas mampinton por alkroĉi sin. Post certatempa kreskado ĝi refoje "naskiĝas" el la poŝo. Ekde tiam la marsupiidoj povas facile en- kaj eliri la poŝon. Marsupiuloj estas ĉefa konsistiga parto de la faŭno de Aŭstralio kun pli ol 120 specioj apartenantaj al 52 genroj de 7 familioj. Tamen iliaj formoj kaj vivkutimoj estas tre diversaj. La plej malgranda el la marsupiuloj pezas nur dekelk gramojn, dum la plej granda 70 kilogramojn. Koalo kun tre komika aspekto estas kvazaŭ viva ludilo. Ĝi manĝas nur foliojn de kelkaj specoj de eŭkalipto.

Rigardo al specimenoj de marsupiuloj

Dromiceo



La lasta grupo de la eksponaĵoj estas makropoj. Ili similas al hufuloj en aliaj kontinentoj kaj nutras sin per herboj. Ili ne povas galopi kiel hufuloj, sed povas elegante salti per la longaj kaj fortaj postaj membroj. Estas pli ol 50 specioj de kangurooj, el kiuj la plej fama granda kanguroo jam fariĝis simbolo de la faŭno de Aŭstralio kaj konsistigas kune kun dromiceo la ŝtatan emblemon.

La ekspozicio estis tre sukcesa en profundigo de la interkompreniĝo kaj amikeco inter la du landoj. Faŭno estas konsistiga parto de la naturo kaj ankaŭ grava fonto de amseno al la hejmloko profunde radikiĝinta en la koro de la popolo. En la historio multaj landoj prenis siajn indiĝenajn animalojn kiel siajn simbolojn. Aŭstralia ambasadoro S-ro Wooddard humore kaj signifoplene diris: "Tiu specime-

noj ne povas paroli, sed ili estas multe pli kompetentaj ol ni homoj kiel reprezentantoj de Aŭstralio."

En Pekino pli ol 80,000 homoj vizitis la ekspozicion, inter kiuj troviĝis zoologoj, muzeistoj, biologiaj instruistoj kaj studentoj pekinaj kaj aliurbaj krom ordinaraj loĝantoj. Dum la tempo fakuloj de ambaŭ landoj faris sukcesajn sciencajn interŝanĝojn. D-ro P. Stanbury, zoologia konsilanto de la ekspozicio kaj kuratoro de la Muzeo Macleay faris plurajn fakajn prelegojn por prezenti al ĉinaj kolegoj pri la faŭno de Aŭstralio, la generado kaj vivkutimoj de monotremoj kaj marsupiuloj kaj pri sperto en funkciigado de natura muzeo. Li havis grandajn interesojn pri la faŭno, zoologia esplorado kaj la laboroj de natura muzeo en Ĉinio. En iu kolokvo li diris, ke li rikoltis multe pli en ĝi ol en ekskursoj. Li espri-

mis, ke li klopodos por akceli sciencon kunlaboron inter ambaŭ landoj.

Ĉinio kaj Aŭstralio havas tute diferencajn faŭnojn, tial ili interŝanĝis kelkajn specimenojn de indiĝenaj animaloj. Ĉinio elektis ĉefe speciojn el paleoarkta regno kaj tiujn speciojn, kiuj havas similajn vivkutimojn kaj tendencon al simileco kun aŭstraliaj animaloj. D-ro Stanbury opiniis, ke la proponita sortimento estas tre bona laŭ la vidpunkto de zoologoj. La kultura konsilantino de la aŭstralia ambasado sinjorino J. Chey diris, ke tiuj specimenoj estos eksponataj tuj post alveno al Aŭstralio, por ke tiea popolo vidu ĉinajn animalojn.

Kvankam komenciĝis nur la zoologia interŝanĝo inter ambaŭ landoj, tamen ni kredas, ke tio senĉese plivastiĝos kaj disvolviĝos.



La sibo-oj

La sibo-oj sume nombras pli ol 26,000 membrojn, kies 70% loĝas en la Ĉapuĉal-a Sibo-nacieca Aŭtonoma Gubernio apud Jili-rivero norde de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj aliaj disen Liaŭning- kaj Gilin-provincoj.

La sibo-oj antaŭe loĝis en la basenoj de Nengiang-rivero, Ĉuoer-rivero (branĉoj de Songhua-rivero) kaj Hulunbojr en nordorienta Ĉinio.

Antaŭ la 16-a jarcento ili sin okupis ĉefe pri ĉasado kaj fiŝkaptado kaj en tiu tempo iliaj agrikulturo kaj brutobredado estis relative postĝintaj. En la fino de la 16-a jarcento, la reganta klaso de la manĉu-nacieco organizis la sibo-ojn en armeon por grandigi sian militan forton. En la mezo de la 18-a jarcento la regantoj de Kingdinastio sendis sibo-ajn trupojn kaj iliajn familianojn al Jili de Hingiang. De tiu tempo ankaŭ en nordokcidenta Ĉinio vivas sibo-oj.

Laŭ notoj en historiaj libroj, la sibo-oj estas posteuloj de la antik-

La sibo-oj kaj la rusoj

de ZONG MIN

Sibo-a virino



vaj ŝjenpi-oj. En la erao Vanli de Ming-dinastio (1573-1619 p.K.), la nomo de la sibo-nacieco jam aperis en historiaj libroj. La sibo-a lingvo apartenas al la tunguzmanĉu-a lingvofamilio de la altaj-lingvosistemo kaj ĝia skriba formo estas bazita sur la manĉu-a, ĉar la sibo-oj havis intiman rilaton kun la manĉu-oj en la historio.

Dum la longa historia disvolviĝo, la sibo-oj sin okupis pri ĉasado kaj fiŝkaptado, pro kio ili estas lertaj en rajdado kaj arkpafado. De centoj da jaroj arkpafado estas ilia ŝatata sporto. Post la Liberiĝo, la arkpafa sporto vaste disvolviĝis inter la sibo-oj. En sia infanaĝo la sibo-aj geknaboj jam eklernas rajdi kaj arkpafi. Ĉiu vilaĝo loĝata de sibo-oj havas sian placon por arkpafa ekzerco kaj arkpafistojn. En libertempo ili ofte okazigas arkpafan konkurson.

La kostumoj de la sibo-oj kaj manĉu-oj estas preskaŭ samaj. La viroj ŝatas porti robon kaj jakon en nigra, blua aŭ bruna koloro kaj rondan ĉapon, kaj la virinoj malvastan robon, blankajn ŝtrumpojn kaj broditajn ŝuojn. La fraŭlinoj havas harplektaĵon kaj post sia edziniĝo hartuberon. La virinoj ŝatas porti orelingojn, arĝentajn braceletojn kaj fingro-ringojn.

La sibo-oj de nordorienta Ĉinio loĝas intermikse kun alinaciecaj popolanoj, dum tiuj de Hingiang loĝas aparte. Ĉiu vilaĝo de la lastaj havas pli ol cent aŭ kelkcent familiojn, tial la loĝantoj povas konservi siajn apartajn lingvon kaj morojn. Multaj sibo-oj scipovas ankaŭ la han-an, uĝur-an kaj kazaĥan lingvojn. Dank' al tio la sibo-a nacieco jam tradukis pli ol 30 klasikajn literaturajn verkojn kiel "La Tri Regno", "Ĉe la Akvorando", "La Okcidenta Ĉambro", kaj modernajn novelojn kiel "La Ĉefa Historio de A-Q" kaj "Gaŭ Jubaŭ".

Nemalmultaj el la Hingiang-aj sibo-aj intelektuloj konas la han-an lingvon tre bone, kaj scipovas ankaŭ la uĝuran kaj kazaĥan lingvojn, tial multaj el ili funkcias kiel instruistoj kaj tradukistoj.

En aŭtuno de 1765, post kiam la imperiestro de King-dinastio sendis la trupojn el sibo-oj kun iliaj familianoj al Jili kaj disdonis al ili semon kaj brutojn, por ke ili terkulturu por mem produkti bezonatan grenon. La baseno de Jili-rivero taŭgas por agrikulturo kaj brutobredado. La meznombra jara kvanto de precipitaĵo de tiu loko estas ĉirkaŭ 350 milimetroj kaj la senprujna periodo estas ĉ. 160 tagoj, kio taŭgas por kreskado de tritiko, rizo, kotono, olelino kaj fruktaj plantoj. Tie estas fekunda tero kaj riĉaj fontoj de karbo kaj minaĵoj, kaj granda kvanto da ligno kaj valoraj drogoj produktiĝas sur la monto Vusun, branĉo de Tianŝan-montaro. Depost la sibo-aj armeo kaj popolo fiksloĝiĝis en tiu loko, ili diligente laboris kaj en kelkdek jaroj turnis virgan teron en riĉan produktejon de greno. Dum la 7 jaroj de 1802 ĝis 1808 la sibo-oj hakis la monton apud Jili-rivero por konstrui la kanalon Ĉapuĉal kun longeco de 100 kilometroj. Neĝakvo de Tianŝan-montaro estis kondukita en la fekundan ebenaĵon, kaj baldaŭ 80,000 muoj (1 muo=1/15 de hektaro) da kampoj estis konstruitaj, kaj tiamaniere la sibo-aj armeo kaj popolo fiksloĝiĝis ĉe ambaŭ flankoj de la granda kanalo. En la pasintaj pli ol 100 jaroj ĝia fekunda kamparo donis riĉajn rikoltojn de greno, kaj vidiĝis ĉie prospera sceno. La sibo-a popolo ĝis nun kantas jene:

*Ĉapuĉal-kanalo estas nia patrin',
pli ol cent jarojn ŝi jam nutris nin.*

Per tio oni prikantus ne nur la kanalon sed ankaŭ la laboremajn

kaj kuraĝajn prapatrojn. La sibo-oj pene laboris por konstrui sian hejmlokon kaj ankaŭ partoprenis en konstruado de Huang-kanalo norde de Jili-rivero, Habudela-kanalo kaj Habelhu-kanalo de la regiono Boeldala k. a. gravaj akvoutiligaj konstruaĵoj en kelkdek jaroj post la finkonstruado de la granda kanalo.

La sibo-oj havas brilan historion de batalado kontraŭ feŭdismo kaj imperiismo. Frue en la 20-aj jaroj de la 19-a jarcento, sibo-a trupo kuraĝe batalis kune kun aliaj nacimulplimulto de Hingiang kaj venkis atakon de 20,000 agresantoj de la reakcia uĝur-a supertavola reganto Ĝahangel, subtenata de la angla imperiismo. Sibo-a soldato Ŝuhing-a kaptis la reakcian ĉefon Ĝahangel. Dum la periodo de 1871 ĝis 1880, la cara Rusio perforte okupis Jili-regionon de nialando, kaj la sibo-aj, uĝuraj kaj kazaĥaj popolanoj falis en abismon de suferoj. En la jaro 1876, la imperiestro de King-dinastio sendis trupojn laŭ tri vojoj al Jili-regiono por repreni la perditan teron kaj la sibo-a popolo varme subtenis ilin. Ili preparis por la armeo fojnon kaj grenon, atakis la malamikojn kune kun la armeo kaj faris kontribuon por repreni la perditan teron.

Antaŭ la Liberiĝo, por batali kontraŭ la reakcia regado de Kuomintang la sibo-oj de Hingiang fondis sian Sendependan Kavalerian Kompanion de Sibo-nacieco kaj faris kontribuon por rapidigi la liberigon de Hingiang en la milito por liberigi la tutan landon.

Post la Liberiĝo, ili akiris grandajn sukcesojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.

La 25-an de marto de 1954, fondiĝis la Ĉapuĉal-a Sibo-nacieca Aŭ-

tonoma Gubernio en la regiono loĝata de sib-oj kaj unuafoje en la historio la sib-o popolo fariĝis mastro en politiko. Sib-oj kadroj rapide kreskas sub la kulturado de la Partio. Laŭ statistiko, ili konsistigis 73.8% de la totala nombro de kadroj de la tuta gubernio en 1974, kaj 81.1% de la kompartianoj de la gubernio estas sib-oj. El tiuj nemalmultaj funkcias kiel gvidantoj de gubernio kaj distrikto. Koncerne al ekonomia konstruado, sib-oj reordigis kaj larĝigis Ĉapuĉal-kanalon kaj instalas al ĝi kluzojn kaj aliajn instalaĵojn, dank' al kio la irigaciata areo pliiĝis per pli ol 40,000 muoj.

Antaŭ la Liberiĝo en tiu regiono tute ne ekzistis moderna industrio kaj nun tie fondiĝis la industrioj de elektro, maŝinfarado, agrikulturo, metalurgio kaj prilaborado de manĝaĵoj kaj elkulturiĝis ankaŭ sib-oj laboristoj.

La kultura, eduka kaj higiena aferoj de tiu gubernio multe disvolviĝis. La gubernio starigis sintezan hospitalon bone ekipitan, ĉiu komunumo havas sian kuracanstacion kaj en la vilaĝoj funkcias koopera kuraca sistemo. La nombro de diversnivelaĵoj kuracaj laborantoj pliiĝis 30-oble ol tiu en la komenco post la Liberiĝo.

La sib-oj ŝatas esprimi siajn sentojn per kantoj. En la malnova socio la popolkanto estis formo por oponi kontraŭ la feŭda regado kaj esprimi sian deziron pri la estonteco. Ekzemple la antikva popolkanto "Jaĉina" profunde malkovras la montran vizaĝon de la feŭda reganta klaso kaj esprimas la noblan deziron de la popolo pri konstruado de ĝia nova vivo. Tiu popolkanto estas vaste cirkulata inter la sib-oj. Post la Liberiĝo la sib-o popolo verkis multajn kantojn por prikanti la Partion kaj Prezidanton Maŭ. La plej ŝatata el ili estas jena:

*Galopas foren, foren la rivero
Jili;*

*el la ĉielo Vusun-monto sin
elŝovas.*

*Kiel ajn longa kaj altega estas
ili,*

*kompari kun la bon' de Prezi-
danto Maŭ ne povas.*

La rusoj

La rusa nacimalplimulto de nia lando havas ĉirkaŭ 9,000 membrojn, kiuj loĝas ĉefe en Jili, Taĉeng kaj Urumĉi de Hingiang kaj Hulunbojr-ejmago, Sunke- kaj Huma-gubernioj k. a. de Hejlonggiang-provinco.

La rusoj venis de la cara Rusio post la 18-a jarcento. Antaŭ la Liberiĝo ili sin okupis ĉefe pri riparado, transportado, kaj iuj ankaŭ pri agrikulturo, ĝardena kulturado kaj bredado de dombestoj kaj abeloj. En la kamparo la rusoj ĝene-

rале loĝas en apartaj vilaĝoj konsistantaj el kelkdek familioj. Inter la rusoj loĝantaj proksime de paŝtregiono troviĝas ankaŭ brutobredistoj.

En la jaro 1944, en la batalo kontraŭ la reakcia regado de Kuomintang multaj rusaj popolanoj partoprenis en la revolucio gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kaj sin ĵetis en la batalon por sia liberiĝo kune kun la aliaj popoloj de Hingiang.


Post la Liberiĝo la rusoj kaj la alinaciecaj popolanoj kune kondukis socialan reformon kaj plene ĝuas politikan rajton en administrado de la ŝtato. Multaj mezaj kaj elementaj lernejoj por rusoj estas plivastigitaj kaj senĉese multiĝas iliaj lernantoj. En la pasintaj pli ol dudek jaroj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la vivo de la rusoj ĉiam pli boniĝas. Ilia laboremo estas laŭdita de la diversnaciecaj popolanoj de tiu loko.



Rusoj de Hingiang

Kamelioj de Junnan-provinco

*Printemp' en suda Junnan vere
fruas,
ke l' kamelioj floras jam en
februaro,
pli bele ol persik' kaj pruno
ĉarmaj,*



*Kamelio de
Junnan*

*formante ruĝajn nubojn ĉie en la
parko.*

La supraj versoj estis verkitaj de ĉina poeto Jang Dian antaŭ 400 jaroj por priskribi florantajn kameliojn de Junnan. De centoj da jaroj, la diversnacieca popolo de Junnan-provinco kulturis kaj aprecas kameliajn florojn. Ĉiujare, je la fino de vintro kaj komenco de printempo, kiam norda Ĉinio ankoraŭ dormas sub blanka neĝo, bril-koloraj kameliaj floroj jam pompas ĉie en Junnan-provinco.

La kamelioj de Junnan-provinco (ĉefe *Camellia reticulata*) estas ĉiamverdaj arboj. Nun en okcidenta parto de tiu provinco troviĝas grandaj parceloj da kamelioj kun aĝo de centoj eĉ centoj da jaroj. Kiam ili floras, la arbokronoj tute


ruĝiĝas kvazaŭ flamantaj torĉoj. La floro de tia sovaĝa kamelio origine havis nur unu tavolon da petaloj. Dank' al zorga kulturado de laborantaj popolanoj en pluraj jarcentoj, nun troviĝas jam dekoj da specoj de kameliaj floroj kun malsamaj grandecoj kaj petalaranĝoj. Ili floras ĝenerale dum la daŭro de ĉ. cent tagoj kaj povas esti plantitaj en potoj aŭ surtere.

Vegetala raŭpo

Vegetala raŭpo (*Cordyceps sinensis*) estas speco de valora drogo uzata kiel toniko laŭ la ĉina farmacio. Ĝi vivas sur herbejo de malvarma montregiono kun alteco de 3,600 ĝis 4,000 metroj en Siĉuan, Junnan, Gujĝou, Tibeto, Gansu kaj Kinghaj. Oni povas ĝin trovi kaj kolekti en majo kaj junio nur per zorga serĉado.

Ĝi estas mirinda pro tio, ke ĝi estas kaj raŭpo kaj herbo. Efektive ĝi estas produktajo de speco de ergotfungo parazite vivanta en raŭpo de verdvespertotino (*Hepialidae*). En vintro hifoj eniĝas en la korpon

Vegetala raŭpo



de la raŭpo kaj konsumas ĝian nutraĵon, tiel ke la raŭpo pleniĝas je hifoj, rigidiĝas kaj mortas. En somero, stromo kreskas el la kapo de la raŭpo en formo de maldika verda bastoneto kun longeco de 4 ĝis 11 centimetroj. La raŭpo similas al silkraŭpo, flava ekstere kaj

blanka interne, kun 8 paroj da piedoj sur la ventro, el kiuj la mezaj 4 paroj estas relative klare videblaj. Ĝi longas je 3 ĝis 5 centimetroj.

En antikva farmakologia verko de Ĉinio "Aldono al Bencaŭgangmu" troviĝas jena paragrafo:

"Vegetala raŭpo produktiĝas en Hualinping de Giangjoŭ-gubernio, Siĉuan-provinco. Vintre ĝi estas raŭpo kaj somere herbo. Ĝi longas je 3 coloj, havas 6 piedojn, tre similas al silkraŭpo supre de la kolo, kaj ĝi estas toniko simila al ginsengo."



«La Faraono» en kasetoj

Unu el la ĉefverkoj de la pola klasika literaturo kaj samtempe unu el la ĉeftradukaĵoj de la Esperanto-literaturo, "La Faraono" de Boleslaw Prus aperis en kasetoj en la lasta septembro. La tuta verko estas jam surbendigita en Esperanto per 38 unuhoraj kasetoj. Ĝin laŭtlegas Andrzej Pettyn.

Oni planas surbendigon ankaŭ de la fama verko de Henryk Sienkiewicz *Quo Vadis* en la traduko de Lidia Zamenhof. Ankaŭ ĝin laŭtlegos Andrezej Pettyn. (laŭ HdE)

La plurlingva matematika terminaro de Meschkowski

La plurlingva matematika terminaro de Meschkowski estas nun tradukata en Esperanton kaj eldonota ĉijare en Paderborn laŭ informo de prof. H. Frank (FRG). (el HdE)

Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED)

La nomita institucio nun havas provizoran estraron, t. e. D-ro J. Pool (Usono), U. Lins (FRG) kaj D. Blanke (GDR). La ĉefa celo de CED estas kunordigi aŭ stimuli sciencajn esplorojn pri la monda lingva problemo. Ĝi alstrebas provizi la internacian esperantomovadon per necesaj sciencaj materialoj, akcelante samtempe en la ekstera scienca mondo intereson pri la lingva problemo precipe pri ĝia solvo pere de Esperanto. (laŭ HdE)

S. U. K. de 1978 en Lieĝo

La kvara sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (SUK) okazos en Lieĝo, Belgio, inter la 6-a kaj 27-a de aŭgusto, 1978. Studobjektoj de tiu ĉi esperantlingva faka aranĝo estos astronomio, psikologio kaj internacia literaturo.

La interesiĝantoj povas kontakti jenan adreson: Someraj Universi-

tataj Kursoj, B.P. 9, B-4,000 Liege X, Belgio. Tie estas mendeblaj ankaŭ la kursotekstoj de antaŭaj SUK-sesioj. (P.P.)

Nova movado rapide disvolviĝas en Irano

Dum la pasintaj 12 monatoj, nova movado rapide progresis en Irano. Antaŭ unu jaro, preskaŭ neniu en tiu lando sciis pri la internacia lingvo Esperanto; nun ĝi estas ofta temo en la gazetaro kaj radio. En 1977, ĉ. 2,000 studentoj finis Esperantajn kursojn, sole ĉe la Universitato de Teherano, kaj en 10 monatoj vendiĝis 14,000 ekzempleroj de lernolibro por Farsi-parolantoj, dufoje represita.

La Kanceliero de Teheran-Universitato, D-ro Motamedi, persone malfermis la unuan Esperantan kurson de 1977, kiun ĉeestis ankaŭ vickancelieroj, dekanoj, profesoroj kaj 300 studentoj. Li esprimis la esperon, ke la disvastiĝo de Esperanto helpos internacian interkomprenadon kaj pacon. (laŭ ING)



La Ĉina-Japana Milito en 1894

ANTAŬ pli ol 80 jaroj, sur la Flava Maro de Ĉinio okazis arda milito inter la Norda Floto de King-dinastio de Ĉinio kaj agresa floto de Japanio.

En la komenco de la milito, grave vundiĝis la komandanto de la ĉina floto Ding Ĵučang kaj iuj poltronaj ŝipestroj fuĝis, sed la vastaj amasoj de patriotaj oficiroj kaj soldatoj brave batalis daŭre. Militŝipo Ĝijuan brave batalis en fronto kaj estis multe trafita de malamikaj pafoj. La ŝipo forte kliniĝis kaj ĝia municio estis preskaŭ elĉerpita. La ŝipestro Deng Ŝičang ordonis la ŝipon navigi en plena vaporo al la avangarda militŝipo de Japanio Joŝino. Malfeliĉe Ĝijuan estis torpedita kaj la 250 ŝipanoj heroe martiriĝis. La patriotaj oficiroj kaj soldatoj de la ĉina floto persiste batalis 5-6 horojn, kaj fine la japanaj ŝipoj retiriĝis. Tio estis unu sceno el la Ĉina-Japana Milito en 1894.

La milito estis provokita de la japana regantaro en aŭgusto de 1894, en praktiko de ekspansia politiko.

En la lastaj jaroj de la 19-a jarcento, diversaj kapitalismaj landoj troviĝantaj en stadio de transiro al financa kapitalo prenis Ĉinion kiel sian ĉefan celajon por agresi kaj prirabi. En la poste leviĝinta militisma Japanio ĉiam pli akriĝis klasa kontraŭdiro pro kruelaj ekspluatado kaj subpremo de bienuloj kaj kapitalistoj al laboristoj kaj kamparanoj. Por trovi elirejon, la japana regan-

taro de longe faris, sub la subteno de la usona imperiismo, agreson kaj rabadon de riĉfontoj de Ĉinio per militaj rimedoj.

La registaro de King-dinastio kaj Li Hongĝang, kiu direktis militajn aferojn, estis poltronaj, senĉese cedis al militaj provokoj de la japanaj agresantoj kaj faris nenian preparon por milito, tial la trupoj de King-dinastio malvenkis foje kaj refoje de la komenco de la milito.

Kvankam la Norda Floto de Ĉinio estis damaĝita en la batalo sur la Flava Maro, tamen ĝia ĉefa forto konserviĝis ankoraŭ kaj povis daŭre batali. Tamen Li Hongĝang ordonis la floton kaŝiĝi en la haveno Vej-hajvej pretekstante konservon de la forto, kaj malpermesis ataki la malamikojn, sekve la floto fariĝis inerta.

Oktobre de 1894, japana terarmeo invadis en du kolonoj nordorientan Ĉinion. Unu kolono okupis sudan parton de Liaŭning-provinco, kaj la garnizonantaj 40,000 armeanoj de King-dinastio forkuris; la alia kolono surteriĝis ĉe la duoninsulo Liaŭdong kaj atakis Dalian kaj Ljuŝun. La armeo de King-dinastio en Dalian forfuĝis, ankaŭ plejparto de tiuj en Ljuŝun forfuĝis, kaj la restantoj estis izolitaj kaj senhelpaj, tial ambaŭ urboj falis. La japana armeo faris en Ljuŝun kruelegan masakradon. En januaro kaj februaro de la sekvanta jaro japana trupo faris ofensivon al la milita haveno Vej-hajvej kaj la Norda Floto en la haveno estis atakata ambaŭflanke. Kaptinte la fortikajn

kanonarojn de King-dinastio, japanaj terarmeanoj ekbombardis per ili la havenon kaj ĝia mararmeo atakis ĝin per torpedoj. Plejparto de la militŝipoj de King-dinastio estis detruitaj. Multaj oficiroj kaj soldatoj rezolute petis fari decidan batalon kun la malamikoj. Sed iuj superaj komandoroj jam sekrete skribis al la invadantoj por kapitulaco. Granda kvanto da municio, la restantaj militŝipoj kaj aliaj militaj bezonaĵoj estis tute fordonitaj al la malamikoj. Likvidiĝis la Norda Floto.

Poste, la japana terarmeo atakis sudan parton de Liaŭning kaj ĝia mararmeo konkeris Penghu-insularon. La King-dinastia registaro petis paciĝon de la japana registaro kaj Li Hongĝang kun sia usona konsilanto iris al japana Ŝimonoseki por intertrakti. Premite de la japana registaro Li Hongĝang subskribis la naciperfidan «Traktaton de Ŝimonoseki», kies ĉefa enhavo estas: Koncesii Liaŭdong-duoninsulon, Tajvan-provincon kaj la insuletojn ĉirkaŭ ĝi al Japanio; pagi 200,000,000 uncojn da arĝento al Japanio kiel kompenso; malfermi la urbojn Ŝaŝi, Ĉongking, Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ ĉe Jangzi-rivero kiel komercejojn; japanaj ŝipoj povis libere navigi en internaj riveroj de Ĉinio; permesi al japanaj kapitalistoj fondi diversajn fabrikojn en la supre diritaj urboj.

Tiamaniere vasta teritorio de Ĉinio fariĝis kolonio de Japanio. La senprecedenca monsumo de kompenso egalas trioblondon de la jara enspezo de la King-dinastia registaro. Kaj

Lokoj menciitaj en artikoloj de tiu ĉi numero

1. Nankino
2. Ĉangvej-subprovinco de Ŝandong
3. La Ĉapuĉal-a Sibonacieca Aŭtonoma Gubernio de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono
4. Hansou-gubernio de Hunan-provinco

la ĉina registaro devis ĝin pagi en tri jaroj, alie interezo devis esti aldonita. Tiu peza ŝarĝo falis sur la vastan laborantan popolon, kaj Japanio rapide disvolvis sian pezan industrion, precipe la militan industrion per la rabita kapitalo por potencigi sian militan maŝinon.

La koncesio de Liaŭdong-duoninsulo al Japanio difinita en la traktato salivigis la caran Rusion, kiu longe avidis nordorientan Ĉinion, kaj ses tagojn post la subskribo de la traktato, la cara Rusio kolektis Germanion kaj Francion por kune interveni. Sub la premo de la tri landoj, Japanio forlasis Liaŭdong-duoninsulon, sed plimultigis la kompensan monsumon je 30,000,000 uncoj da arĝento. Post tri jaroj, la cara Rusio perforte okupis Ljuŝun kaj Dalian. En la jaro 1900 ĝi okupis ankaŭ la urbegojn de nia Nordoriento.

Samtempe kun la senhonta kaptulacado de la King-dinastia regantaro, la tutlanda popolo faris aktivan oponon kontraŭ la japanaj agresantoj. Kiam japana armeo invadis la orientan parton de Liaŭning, tieaj kamparanoj, ministoj kaj ĉasistoj rezistadis kontraŭ la



malamikoj. Kiam la King-dinastia registaro fordonis Tajvan-provincon, pli indigniĝis la tutlanda popolo. La popolo de urbo Tajbej de Tajvan-provinco tuj ĉesigis sian negocon signalante per gongoj por protesti kaj juris ĝismorte batali por teni Tajvan. La popolo de Tajvan publikigis dekreton kiu diris, ke ili estas pretaj tuj mortigi Li Hongĝang kaj la aliajn naciperfidulojn, kie ajn ili estos renkontitaj.

Tajvan-anoj arme rezistis al la japana armeo. Ili mortigis kaj vundis pli ol 30,000 japanajn agresantojn. Duono de la gvardia divizio, la ĉefa forto de japana armeo en agreso al Tajvan estis ekstermita kaj ĝia estro Joĝi Hisa mortis grave

vundite. La Tajvan-a popolo skribis prikantindan paĝon de rezistado al imperiismo. Post tio, la Tajvana popolo per sia malcedema batalo daŭre batalis kontraŭ la japanaj koloniistoj 50 jarojn ĝis la jaro 1945, kiam la lastaj senkondiĉe kaptulacis. Laŭ la decido de la "Deklaro de Kairo" kaj la "Deklaracio de Potsdam" Tajvan denove revenis en la sinon de Ĉinio.

Ĉinio pliapaŝe koloniigis sekve de la Ĉina-Japana Milito en 1894 kaj de tiam diversaj imperiismaj landoj intensigis sian batalon en Ĉinio por kapti koncesion kaj influferojn kaj eksporti kapitalon en Ĉinion. Ĉinio alfrontis la danĝeron esti distranĉita kaj dividita de imperiismaj potencoj.

Novaj ĉinaj esperantaj eldonaĵoj

Pri Dek Gravaj Interrilatoj:

Tio ĉi estas parolado de Kamarado Maŭ Zedong, farita en la plivastigita kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En tiu parolado Kamarado Maŭ Zedong, ĉerpante lecionojn el la sperto de Sovetunio, resumis la sperton de nia lando, eksplikis dek gravajn interrilatojn en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado kaj elmetis fundamentan penson pri la ĝenerala linio "multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon", konforme al la kondiĉoj de nia lando.

38 paĝoj 13 × 18.5 cm.

Prezo: £ 0.06 US\$ 0.15 FF 0.70 DM 0.60



Koloraj Nuboj:

La novelaro verkita de Haŭ Ĵan priskribis novajn homojn, kiuj aperis en la movado de komunumigo en la kamparo. Inter ili troviĝas bazaj kadroj sinforĝesaj en pena laborado kaj intime ligiĝantaj kun la amasoj, junuloj bravaj energiaj kaj multepromesaj, virinoj liberiĝantaj el la rutinaj kutimoj kaj vivgajaj. Per malsamaj karakterizoj de la herooj la aŭtoro montras iliajn noblajn kvalitojn.

156 paĝoj kun 12 ilustraĵoj 12 × 18.7 cm.

Prezo: £ 0.45 US\$ 1.10 FF 5.60 DM 4.50



Kvin Herooj sur Langja-monto:

Tiu ĉi bildrakonto priskribis heroaĵojn en la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio.

40 paĝoj 19 × 17.5 cm.

Prezo: £ 0.13 US\$ 0.30 FF 1.60 DM 1.30



Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio


Bonvolu mendi ĉe peranto vialoka, aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Nanĉang, ĉefurbo de Gianghi- provinco



Bajhuaĝoŭ de Nanĉang

La nomita urbo havas historion de pli ol 2,000 jaroj. Frue en la Okcidenta Han-dinastio ĝi jam estis prospera loko sude de Jangzi-rivero. Nun, ĝi estas centro de politiko, ekonomio, militaj aferoj, kulturo kaj trafiko de la provinco. La areo de la urbo plivastiĝis jam de 8.28 kvadrataj



La ĉefstabejo de
la Nanĉang-a Le-
viĝo de la Unua
de Aŭgusto



kilometroj antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 170 kvadrataj kilometroj kaj la loĝantaro kreskis de 200,000 antaŭ la Liberiĝo ĝis 800,000.

La unuan de aŭgusto, 1927, la Komunista Partio de Ĉinio tie faris arman leviĝon kaj faris la unuan pafon al la reakciularo de Kuomintango. Ĉar la urbo rilatas al tiu ĉi historia evento kaj rilatas al la nomo de Goŭ Enlaj, la gvidanto de la evento, ĝi estas aparte respektata.

Antaŭ la Liberiĝo, en la urbo estis neniu fabriko kun pli ol 500 laboristoj, sed nur malgran-




daj tekstila fabriko, maŝinriparejoj kaj kelkaj metiejoj. Nun tie troviĝas ĉ. 1,000 fabrikoj, el kiuj 89 havas po 500 ĝis kelkmil laboristoj. La urbo havas industriojn de fero kaj ŝtalo, maŝinoj, aŭtoj, traktoroj, elektroniko, tekstilajoj, papero, medikamento k. a. La produktokvanto de kotonaj fadenoj en 2 tagoj kaj tiu de kotonaj ŝtofoj en 5 tagoj egalas respektive tiujn de unu jaro antaŭ la Liberi-

ĝo, la totala nombro de laboristoj kreskis de malpli ol 4,000 antaŭ la Liberiĝo ĝis 200,000 kaj la totala produktovaloro de la industrio kreskis 58-oble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La antaŭe konsumata urbo nun fariĝis nova industria urbo.

Kvankam antikvuloj diris, ke la urbo estas bela, tamen la reakciaj regantoj de ĉiuj dinastioj faris ĝin kripla. Tiam ĉie en la urbo troviĝis

La Gianghi-a Hotelo





La strato La Unua de Aŭgusto

Antaŭa aspekto de la strato La Unua de Aŭgusto




ŝlimaj fosajoj kaj stinkaj lagetoj. La tiel nomata plej vigla Cujhua-strato en la urbo estis nur nepavimita vojo, je 1 kilometro longa kaj je malpli ol tri metroj larĝa, kie stagnis akvo post pluvado. Sed en la nuna Nanĉang estas multaj etaĝaj domoj kaj fabrikoj. La popolo de la urbo konstruis la straton "La Unua de Aŭgusto" kun larĝeco de 50 metroj kaj longeco de 5 kilometroj sur la mal-

nova urboprotekta fosajo kaj fetora lageto oriente de la urbo. Ĝi trapasas la tutan urbon en la direkto de sudo al nordo, kaj estas trafika aorto de la urbo. Inter la altaj konstruaĵoj ambaŭflanke de la strato troviĝas la Memorhalo de Revoluciaj Martiroj, la Ekspoziciejo de la Revolucia Historio, la Historia Muzeo, la Gianghi-a Hotelo, la Poŝta kaj Telegrafa Domego, la Laborista Kultura



La Popola Placo en festa nokto



Kuracistoj de la Gianghi-a Virina Sanitarejo esploras pri prevento kaj kuracado de uter-cervika kancero.

Palaco, teatro, Metiarta kaj Belarta Domo, hospitalo kaj magazenoj, kaj krome, ankaŭ estas la Gianghi-a Medicina Instituto, la Gianghi-a Ĉin-medicina Instituto kaj mezaj kaj elementaj lernejoj. La strato estas borderita per tungarboj. En la meza parto de la strato estas la Popola Placo nove konstruita, kiu povas enteni 200,000 homojn kaj meze de la placo estas smeralda razeno kun floroj. La vojo pavimita per betono ĉirkaŭiras la placon. Sude de la strato estas unu el la nove konstruitaj industriaj kvartaloj, kie sin trovas la Gianghi-a

Traktora Fabriko, unu el la gravaj industriaj entreprenoj de la tuta lando en produktado de traktoroj; norde de la strato estas impona ponto "Ĵa Unua de Aŭgusto" super Gangiang-rivero kaj starante sur la pontego oni povas vidi alian pontegon por fervojo kaj ŝoseo malsupre, kiu ligas la fervojon de Nanĉang ĝis Giugiang kun la fervoja reto de la tuta lando.


Nanĉang, la heroo urbo vivecplena marŝas antaŭen sur la socialisma vojo.



En magazeno

Traktoroj produktitaj de la Gianghi-a Traktora Fabriko





**Tang-dinastiaj
trikoloraj glazuraĵoj**

Henanta ĉevalo



Teksto kaj bildoj
de DING VU



1.
Ludante en bambua arbaro la pandido subite aŭdis
helpkrion.

Tang-dinastiaj

En la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420 — 589 p. K.), oni komencis fari trikolorajn fajencaĵojn en Luojang de Henan-provinco. Tiu metio plej multe prosperis en Tang-dinastio (618 — 907 p. K.), kaj pro tio tiaj fajencaĵoj, kiuj estas kolorigitaj ĉefe per ruĝa, verda kaj blanka glazuroj, ricevis la nomon Tang-dinastiaj trikoloraj glazurajoj.

La formoj de la Tang-dinastiaj trikoloraj fajencaĵoj karakteriziĝas per rondeco, forteco kaj majesteco, kaj iliaj koloroj estas brilaj. Tiaj fajencaĵoj estas ĉefe hom- kaj best-figuroj kaj diversaj vazoj. En la lastaj jaroj, metiistoj de trikoloraj fajencaĵoj kaj sciencaj laborantoj utiligis la antikvaĵon en servo al la nuntempo, heredante la bonan tradicion de tiu arto, reformis la teknologion kaj kreis multajn novajn produktadojn. La specoj de modernaj trikoloraj fajencaĵoj nombras pli ol 300. Ili pliriĉigis la vivon de la ĉina popolo kaj kontribuis al la internacia kultura interfluo kaj amika komerco.



Kamelo



2.
La pandido rimarkis, ke lia bona amiko kaprido estas kaptita de maljuna lupu.



3.
Raportinte tion al sia avo kaj onklo kapro la pandido interkonsiliĝas kun ili por savi la kapridon.

trikoloraj glazuraĵoj



Tigrokapa pokalo
kaj feniksokapa
kruĉo

Ĉevaloj



4.
Sajnigante sin kuiristo la pandido venis al la hejmo de la maljuna lupo.



5.
La maljuna lupo boligas akvon. La pandido diras: "Mi venas por labori kiel via kuiristo."



6.
La maljuna lupo ne tute kredas tion, la pandido do elmontris botelon da vino: "Rigardu, kio estas tio ĉi?"



7.
Vino! La maljuna lupo eksalivumis. Kaptinte la botelon ĝi eltrinkis la vinon en unu spiro.



8.
Kiam la pandido demandas kion ĝi volas manĝi, ĝi jam morte ebriiĝis.



9.
La pandido haste kuris al la montkavo kaj liberigis la kapridon.



10.
Ili revenis al la kuirejo kaj interligis per ŝnuro la maljunan lupon je la piedoj kaj tenilon de kaldrono.



11.
Apenaŭ ili eliris el la pordo, la maljuna lupu rektigis siajn gambojn kaj renversis la kaldronon. La bolanta akvo verŝigis sur ĝin.



12.
La pandido kaj la kaprido revenas hejmen ĝoje kantante.



8152



世界语《中国报道》一九七八年第三期（本刊代号：二——九一五）